

eLIBRO

Karel Čapek

R. U. R.

Rossumaj
Universal-
Robotoj

I N K O



Karel Čapek

R. U. R.

Rossumaj Universal-Robotoj

Esperantigis Moraviaj Esperanto-Pioniroj

Olomouc 1926

Skanis kaj tekstigis Miroslav Malovec

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-162-3

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

JULIO 2002

PERSONOJ

HARRY DOMIN, *centra direktoro de "Rossumaj
Universal-Robotoj"*

INĜ-O FABRY, *ĝenerala teknika direktoro de R.U.R.*

D-RO GALL, *estro de la fiziologia kaj esplora departe-
mento de R.U.R.*

D-RO HALLEMEIER, *estro de la instituto por psiko-
logio kaj eduko de Robotoj*

KONSULO BUSMAN, *ĝenerala komerca direktoro de
R.U.R.*

ALQUIST *konstruisto de R.U.R.*

HELENA GLORY

NANA *ŝia vartistino*

MARIUS *Roboto*

SULLA *Robotino*

RADIUS, DAMON, *Robotoj*

2., 3., 4. *Robotoj*

ROBOTO PRIMUS

ROBOTINO HELENA

ROBOTA SERVISTO *kaj multaj Robotoj*

- DOMIN *en la antaŭludo proksimume tridekokjara, alta, glatrazita.*
- FABRY *blondulo, ankaŭ glatrazita de serioza kaj delikata mieno*
- HALLEMEIER *robusta grandegulo kun flavruĝaj anglaj lipharoj kaj flavruĝa, brosimila frizaĵo*
- D-ro GALL *eta, vigla brunulo kun nigraj lipharoj*
- BUSMAN *dika, kalva, miopa hebreo*
- ALQUIST *pliĝa ol la aliaj, malzorge vestita kun longaj griziĝintaj haroj kaj barbo*
- HELENA *tre eleganta*

En la dramo mem ĉiuj 10 jarojn pli aĝaj

- ROBOTOJ *estas vestitaj en la antaŭludo kiel homoj. Iliaj movoj kaj paroloj estas koncizaj, la mienoj senesprimaj, la rigardoj rigidaj. En la dramo mem ili havas tolbluzojn zonumitajn per rimeno kaj sur la brusto latunan numeron.*

Post la antaŭludo kaj la dua akto paŭzo.

ANTAŬLUDO

Centra oficejo de la uzino de "Rossumaj Universal-Robotoj". Dekstre enirejo. Tra fenestroj en la frunta muro perspektivo kun senfinajn vicojn de uzinaj konstruaĵoj. Maldekstre pluraj direkciaj ejoj.

Domin *sidas en turnebla apogseĝo ĉe granda amerika skribtablo. Sur la tablo elektra lampo, telefono, paperpeziloj, leterordigilo k.t.p., sur la muro maldekstre grandaj geografiaj kartoj kun ŝip- kaj fervoj-linioj, granda kalendaro, horloĝo, kiu montras iom antaŭ tagmezo; sur la muro dekstre estas alnajlitaj presitaj afiŝoj: "Plej malmultekosta laboro: Rossumaj Robotoj". "Tropikaj Robotoj, nova invento. Peco po 150 d." "Ĉiu aĉetu propran Roboton al si". "Ĉu vi volas malkarigi viajn produktaĵojn? Mendu Rossumajn Robotojn". Plue aliaj geografiaj kartoj, ŝipa hortabelo, tabelo kun telegrafe indikitaj kurzoj k.t.p. Kontraste al ĉi tiu ornamo de muroj kuŝas sur la planko luksa turka tapiŝo, dekstre ronda tablo, kanapo,*

ledaj klubaj apogseĝoj kaj libroŝranko, en kiu troviĝas boteloj da vino kaj brandoj anstataŭ libroj. Maldekstre kaso. Apud la tablo de Domin skribmaŝino, je kiu skribas la knabino SULLA.

Domin

diktas

”— ke ni ne garantias pri komercaĵoj dumvoje difektitaj. Ni atentigis vian ŝipestron tuj ĉe la enŝipigado, ke la ŝipo ne taŭgas por transporto de Robotoj —”

Eksonoras la domtelefono. Domin levas ĝin kaj parolas:

Halo — Ĉi tie centra — jes. — Certe. — Nu jes, kiel ĉiam. — Kompreneble, kablu al ili. — Bone.

li pendigas la telefonon

Kie mi ĉesis?

Sulla

Ni konfirmas la mendon de dek kvin mil Robotoj.

Domin

ekmeditante

Dek kvin mil Robotoj. Dek kvin mil Robotoj.

Marius

malfermas la pordon

Bonvolu, sinjorino.

Eniras HELENA GLORY. MARIUS foriras.

- Domin** *ekstaras*
Bonvolu!
- Helena** Ĉu la centra direktoro Domin?
- Domin** Je via dispono.
- Helena** Mi venas al vi —
- Domin** — kun karto de prezidanto Glory. Tio sufiĉas.
- Helena** Prezidanto Glory estas mia patro. Mi estas Helena Glory.
- Domin** Fraŭlino Glory, estas por ni nekutima honoro, ke — ke —
- Helena** — ke ni ne povas eligi vin tra pordo.
- Domin** — ke ni povas bonvenigi la filinon de la granda prezidanto. Mi petas, sidiĝu. Sull, vi povas foriri.
- SULLA foriras*
- Domin** *eksidas*
Per kio mi povas servi, fraŭlino Glory?
- Helena** Mi venis —
- Domin** — por rigardi nian fabrikadon de homoj. Kiel ĉiuj vizitoj. Tre volonte! Sen ceremonio!
- Helena** Mi pensis, ke estas malpermesite —
- Domin** — eniri la uzinon, kompreneble. Sed ĉiu venas tien ĉi kun ies vizitkarto, fraŭlino Glory.

- Helena** Kaj — kaj — vi montras al ĉiu ?
- Domin** Nur ion. Fabrikado de la artefaritaj homoj, fraŭlino, estas fabrika sekreto.
- Helena** Se vi scius, kiel min tio —
- Domin** — treege interesas. Malnova Eŭropo eĉ ne parolas pri io alia.
- Helena** Kial vi ne lasas min finparoli?
- Domin** Mi petas pardonon. Ĉu vi volis eble diri ion alian?
- Helena** Mi volis nur demandi —
- Domin** — ĉu mi ne montrus tute escepte al vi nian uzinon. Nu certe, fraŭlino Glory.
- Helena** Kiel vi scias, ke mi volis demandi tion?
- Domin** Ĉiuj demandas pri la samo.
- li ekstaras*
- Pro neordinara estimo, fraŭlino, mi montrus al vi pli ol al la aliaj kaj — unuvorte ...
- Helena** Mi dankas vin.
- Domin** Se vi garantios, ke vi perfidos al neniu eĉ la plej malgravan —
- Helena** *ekstaras kaj donas al li la manon*
- Je mia honoro.
- Domin** Mi dankas. Ĉu vi ne volus eble demeti la vualon?
- Helena** Aĥ kompreneble, vi volas vidi — Pardonu!
- Domin** Kion?

- Helena** Se vi liberigus mian manon ...
- Domin** *liberigas ĝin*
Mi petas, pardonu!
- Helena** *demetas la vualon*
Vi volas vidi, ĉu mi ne estas spiono. Kiel singardaj vi estas.
- Domin** *observas ŝin entuziasme*
Hm — kompreneble — ni — jes.
- Helena** Ĉu vi ne konfidas al mi?
- Domin** Neordinare, fraŭlino Hele- — pardonu, fraŭlino Glory. Efektive neordinare ĝojigita — Ĉu vi ŝipveturis agrable?
- Helena** Jes. Kial —
- Domin** Ĉar — mi opinias — ke vi estas ankoraŭ tre juna.
- Helena** Ĉu ni iros tuj en la uzinon?
- Domin** Jes. Mi pensas dudek du, ĉu ne?
- Helena** Dudek du kion?
- Domin** Dudek du jarojn.
- Helena** Dudek unu. Kial vi volas scii tion?
- Domin** Pro tio — ĉar —
kun entuziasmo
Vi restos ĉi tie pli longe, ĉu ne?
- Helena** Laŭ tio, kion vi montros al mi el la fabrika-
do.

Domin Diabla fabrikado! Nu certe, fraŭlino Glory, vi vidos ĉion. Mi petas, eksidu! Ĉu interesus vin la historio de la invento?

Helena Jes, mi petas vin.

ŝi eksidas

Domin Nu do.

li sidiĝas sur la skribtablon, observas ravita Helenan kaj rapide kvazaŭrespondas

Estis en jaro 1920, kiam la maljuna Rossum, granda fiziologo, sed tiam ankoraŭ juna sciencisto, veturis sur ĉi tiun malproksiman insulon por studi maran animalaron. Punkto. Dum tio li provadis per kemia sintezo imiti vivan materion nomatan protoplasmo ĝis iun fojon neatendite li inventis materion, kiu kondukis tute same kiel viva materio, kvankam ĝi havis alian kemian konstituon. Tio estis en la jaro 1932, ĝuste kvarcent kvardek jaroj post la malkovro de Ameriko, uf.

Helena Ĉu vi scias tion parkere?

Domin Jes; fiziologio, fraŭlino Glory, ne estas mia metio. Do, ĉu pluen?

Helena Nu bone.

Domin *solene*

Kaj tiam, fraŭlino, la maljuna Rossum skribis inter siajn kemiajn formulojn jenon: "La naturo trovis nur unu metodon, kiel organizi vivan materion. Sed estas ankoraŭ alia metodo, pli simpla, pli formebla kaj pli rapida, kiun la naturo eĉ ne ektuŝis. Ĉi tiun alian vojon, kiun povis sekvi evoluo de la vivo, mi trovis hodiaŭ". Imagu al vi, fraŭlino, ke ĉi tiujn gravajn vortojn li skribis super eltusaĵo de ia koloida gelo, kiun eĉ hundo ne estus manĝinta. Imagu al vi lin sidantan super epruveto kaj pripensantan, kiel elkreskos el ĝi tuta arbo de vivo, kiel elirados el ĝi ĉiuj bestoj, komencante de iu infuzorio kaj finante — finante per la homo mem. Per homo el alia materio ol ni estas. Fraŭlino Glory, tio estis momento giganta!

Helena Do pluen.

Domin Pluen? Nun estis la tasko eligi la vivon el la epruveto kaj rapidigi la evoluon kaj fabriki iajn organojn, ostojn kaj nervojn kaj tion kaj alion, kaj trovi iajn materiojn, katalizatorojn, enzimojn, hormonojn kaj tiel plu, mallonge, ĉu vi komprenas tion?

- Helena** Mi n-n-ne scias. Mi pensas, ke nur mal- multe.
- Domin** Mi absolute nenion. Sciu, per tiaj likvaĵoj li kapablis fari, kion li volis. Li kapablus, ekzemple, formi meduzon kun Sokrata cerbo aŭ lumbrikon longan kvindek metrojn. Sed, ĉar li posedis nek eron da komik-sento, li ekintencis fari normalan vertebrulon aŭ eble homon. Li do eklaboris.
- Helena** Kion?
- Domin** Imiti naturon. Plej frue li provis fari artefaritan hundon. Li klopodis kelkajn jarojn pri tio kaj fine iĝis el tio io kvazaŭ kripliĝinta bovido, kiu mortaĉis post kelkaj tagoj. Mi montros ĝin al vi en la muzeo. Kaj poste la maljuna Rossum eklaboris jam por produkti homon.
- paŭzo*
- Helena** Kaj ĉu ne estas permesite perfidi ĉi tion al iu?
- Domin** Al neniu en la mondo.
- Helena** Domaĝe, ke tio estas jam en ĉiuj legolibroj.
- Domin** Domaĝe.
- li desaltas de la tablo kaj eksidas apud Helena*

Sed ĉu vi scias, kio ne estas en la legolibroj?

li frapetas sian frunton

Ke maljuna Rossum estis mirinda naivulo. Serioze, fraŭlino Glory, sed ĉi tion lasu ĉe vi. La maljuna ekstremulo volis efektive produkti homojn.

Helena
Domin

Sed vi ja produktas homojn!

Proksimume, fraŭlino Helena. Sed maljuna Rossum pensis tion laŭvorte. Komprenu, li intencis kvazaŭ science sentronigi Dion. Li estis terura materialisto kaj tial li faris ĉion ĉi. Li intencis nenion pli, ol pruvi, ke ia Dio ne estis necesa. Tial li ekhavis fiksan ideon produkti homon precizege tian, kiaj ni estas. Ĉu vi konas iomete anatomion?

Helena
Domin

Nur — tro malmulte.

Mi ankaŭ. Imagu al vi, ke li encerbigis al si fabriki ĉion ĝis la lasta glando kiel en la homa korpo. Cekumon, migdalglandojn, umbilikon, nurajn superfluaĵojn. Ja eĉ — hm — eĉ seksajn glandojn.

Helena
Domin

Sed ĉi tiuj do — ĉi tiuj ja —

— ne estas superfluaĵoj, mi scias. Sed, se la homoj estas industrie fabrikotaj, tiam estas — hm — neniel necese —

Helena Mi komprenas.

Domin Mi montros al vi en la muzeo, kion li finfuŝis dum dek jaroj. Tio povus prezenti viron, ĝi vivis tutajn tri tagojn. Maljuna Rossum ne havis ian belguston. Estis teruraĵo, kion li produktis. Sed interne tio havis ĉion, kion havas la homo. Efektive, treege enuiga laboro. Kaj tiam venis tien ĉi inĝeniero Rossum, la nevo de la maljunulo. Genia kapo, fraŭlino Glory. Tuj kiam li vidis, kion faraĉas la maljunulo, li diris: "Produkti unu homon dum dek jaroj estas sensencaĵo. Se vi ne fabrikados ĝin pli rapide ol la naturo, tiam lasu la aferon kuri!" Kaj li ekstudis anatomion mem.

Helena En la legolibroj estas skribite alie.

Domin *ekstaras*

En la legolibroj estas pagita reklamo, kaj cetere sensencaĵo. Oni legas tie, ekzemple, ke Robotojn inventis la maljuna mastro. Sed la maljunulo taŭgis eble por universitato, sed pri fabrikado li ne havis eĉ ideon. Li pensis, ke li faros efektivajn homojn, do eble iajn novajn indianojn, docentojn aŭ idiotojn, ĉu vi komprenas? Kaj nur la juna Rossum havis la ideon fabriki el tio vivajn

kaj inteligentajn labormasinojn. Kio estas en la legolibroj pri kunlaborado de ambaŭ grandaj Rossumoj, estas babilajo. Tiuj du terure disputaĉis. La maljuna ateisto havis neniom da kompreno pri industrio, kaj fine la juna fermis lin en iun laboratorion, por ke li tie daŭrigu siajn grandajn abor- tojn, kaj komencis mem fabrikadi tion laŭ inĝeniera maniero. La maljuna Rossum lin laŭvorte malbenis kaj ĝis sia morto li fin- fuŝis ankoraŭ du fiziologiajn monstrojn, ĝis fine oni trovis lin senviva en la labora- torio. Tio estas la tuta historio.

Helena
Domin

Kaj la juna?

La juna Rossum, fraŭlino, tio estis nova epoko. Epoko de fabrikado post epoko de ekkono. Kiam li iom pririgardis anatomion de la homo, li tuj vidis, ke ĝi estas tro kom- plika kaj ke bona inĝeniero estus ĝin farin- ta pli simplan. Do li komencis transformi la anatomion kaj eksperimentadis, kion oni povus forlasi aŭ simpligi — mallonge, fraŭlino Glory, ĉu tio ne tedas vin?

Helena

Ne, male, tio estas terrure interesa.

- Domin** Do la juna Rossum diris al si: Homo estas io, kio — ni diru — sentas ĝojon, ludas violonon, deziras promeni kaj entute bezonas fari amason da aferoj, kiuj — kiuj estas efektive superflujaj.
- Helena** Oho!
- Domin** Atendu. Kiuj estas superflujaj, se ekzemple ĝi devas teksti aŭ adicii. Naftomotoro ne devas havi kvastojn kaj ornamantojn, fraŭlino Glory. Kaj fabriki artefaritajn laboristojn estas la samo, kiel fabriki naftomotorojn. La fabrikado devas esti kiel eble plej simpla kaj la fabrikaĵo praktike plej bona. Kion vi opinias, kia laboristo estas praktike plej bona?
- Helena** Plej bona? Eble tiu, kiu — kiu — Se li estas honesta — kaj sindona.
- Domin** Ne, sed la plej malmultekosta. Tiu, kiu havas la plej malmultajn bezonojn. La juna Rossum elpensis laboriston kun plej malgranda kvanto da bezonoj. Li devis lin simpligi. Li forĵetis ĉion, kio senpere ne servas al laboro. Tiamaniere li vere elĵetis la homon kaj faris Roboton. Kara fraŭlino Glory, Robotoj ne estas homoj. Ili estas mekanike pli perfektaj ol ni, ili posedas

miregindan intelektan kapablecon, sed ili ne havas animon. Ho, fraŭlino Glory, la produkto de la inĝeniero estas teknike pli preciza ol la produkto de la naturo.

Helena Oni diras, ke la homo estas kreaĵo de Dio.

Domin Des pli malbone. Dio ne havis eĉ ideon pri moderna tekniko. Ĉu vi kredus, ke la mortinta juna Rossum ekludis rolon de Dio?

Helena Kiel, mi petas vin?

Domin Li komencis fabriki Superrobotojn. Laborgigantojn. Li ekprovis tion per kvarmetraj staturoj, sed vi ne kredus, kiel tiuj mamutoj rompiĝadis.

Helena Rompiĝadis?

Domin Jes. Pro nenio krevis ilia piedo aŭ io alia. Nia planedo estas verŝajne iomete malgranda por gigantoj. Nun ni fabrikas nur Robotojn de natura grandeco kaj de tre konvena homa fasono.

Helena Mi vidis la unuajn Robotojn ĉe ni. La komunumo aĉetis ... mi volas diri dungis ilin por laboro —

Domin Ĝi aĉetis ilin, kara fraŭlino. Robotojn oni aĉetas.

Helena — ĝi akiris ilin kiel stratbalaistojn. Mi vidis ilin balai. Ili estas tiel strangaj, tiel silentaj.

- Domin** Ĉu vi vidis mian skribistinon?
- Helena** Mi ne atentis.
- Domin** *sonorigas*
Sciu, la akcia uzino de "Rossumaj Universal-Robotoj" ne fabrikas nur unuspecan komercaĵon. Ni havas pli aŭ malpli kvalitajn Robotojn. La pli bonaj vivos eble dudek jarojn.
- Helena** Ĉu ili pereas poste?
- Domin** Jes, ili eluziĝas.
eniras SULLA
- Domin** Sulla, montru vin al fraŭlino Glory.
- Helena** *stariĝas kaj donas al ŝi la manon*
Mi estas ĝojigita. Verŝajne estas terure malgaje al vi tiel malproksime de la mondo, ĉu ne?
- Sulla** Tion mi ne scias, fraŭlino Glory. Bonvolu sidiĝi, mi petas.
- Helena** *eksidas*
De kie vi estas, fraŭlino?
- Sulla** De ĉi tie, el la uzino.
- Helena** Aĥ, ĉu vi naskiĝis ĉi tie?
- Sulla** Jes, mi estis ĉi tie fabrikita.
- Helena** *eksaltas*
Kio?

- Domin** *ridas*
Sulla ne estas homo, fraŭlino. Sulla estas Roboto.
- Helena** Mi petas pardonon —
- Domin** *metas la manon sur la ŝultron de Sulla*
Sulla ne koleras. Rigardu, fraŭlino Glory, kian vizaĝhaŭton ni fabrikas. Palpu ŝian vangon.
- Helena** Ho, ne, ne!
- Domin** Vi ne ekkonus, ke ŝi estas el alia materio, ol ni. Atentu, ŝi havas eĉ la tipan lanugon de blondulinoj. Nur la okuloj estas iomete — — — Sed des pli la haroj! Turnu vin, Sulla!
- Helena** Ĉesu jam!
- Domin** Parolu iom kun la gasto, Sulla. Estas malofta vizito.
- Sulla** Mi petas, fraŭlino, sidiĝu.
ili sidiĝas
Ĉu vi bone ŝipveturis?
- Helena** Jes — ce — certe.
- Sulla** Ne veturu reen sur Amelio, fraŭlino Glory. La barometro tro malleviĝas, ĝis 705. Atendu Pensilvanion, ĝi estas tre bona, tre fortika ŝipo.
- Domin** Kiom?

- Sulla** Dudek nodojn en unu horo. Ŝarĝkapableco dek du mil.
- Domin** *ridas*
Sufiĉe, Sulla, sufiĉe! Montru al ni, kiel vi scipovas la francan?
- Helena** Ĉu vi scipovas la francan?
- Sulla** Mi scipovas kvar lingvojn. Mi skribas:
Dear Sir! Monsieur! Geehrter Herr! Estimata sinjoro!
- Helena** *eksaltas*
Tio estas trompaĵo! Vi estas ĉarlatano! Sulla ne estas Roboto, Sulla estas knabino kiel mi! Sulla, tio estas malhonesto! — Kial vi ludas tian komedion?
- Sulla** Mi estas Roboto.
- Helena** Ne, ne, vi mensogas! Ho, Sulla, pardonu, mi scias — ili devigis vin, por ke vi faru reklamon al ili! Sulla, vi estas knabino kiel mi, ĉu ne? Diru!
- Domin** Mi bedaŭras, fraŭlino Glory. Sulla estas Roboto.
- Helena** Vi mensogas!
- Domin** *rektigas sin*
Kion? —
li eksonorigas

Pardonu, fraŭlino, do mi devas konvinki vin.

eniras MARIUS

Domin Marius, konduku Sullan en la sekcejon, por ke oni malfermu ŝin. Rapide!

Helena Kien?

Domin En la sekcejon. Post kiam oni distranĉos ŝin, vi iros rigardi ŝin.

Helena Mi ne iros!

Domin Pardonu, vi parolis pri mensogo.

Helena Ĉu vi volas, ke oni mortigu ŝin?

Domin Maŝinojn oni ne mortigas.

Helena *ĉirkaŭbrakas Sullan*

Ne timu, Sulla, mi defendos vin! Diru, karulino, ĉu ĉiuj estas tiel barbaraj kontraŭ vi? Tion vi ne devas toleri, ĉu vi aŭdas? Vi ne devas, Sulla!

Sulla Mi estas Roboto.

Helena Estas egale. Robotoj estas same bonaj homoj kiel ni. Sulla, ĉu vi lasus vin distranĉi?

Sulla Jes.

Helena Ho, ĉu vi ne timas morton?

Sulla Mi ne konas ĝin, fraŭlino Glory.

Helena Ĉu vi scias, kio fariĝus kun vi?

Sulla Jes, mi ĉesus movi min.

Helena Tio estas terrura!

- Domin** Marius, diru al la fraŭlino, kio vi estas.
- Marius** Roboto Marius.
- Domin** Ĉu vi donus Sullan en la sekcejon?
- Marius** Jes.
- Domin** Ĉu vi kompatas ŝin?
- Marius** Tion mi ne konas.
- Domin** Kio fariĝus kun ŝi?
- Marius** Ŝi ĉesus movi sin. Oni ĵetus ŝin en pistma-
ŝinon.
- Domin** Tio estas morto, Marius. Ĉu vi timas mor-
ton?
- Marius** Ne.
- Domin** Do vidu, fraŭlino Glory. Robotoj ne ŝate-
gas la vivon. Ili ja ne scias pro kio. Ili ne
havas ĝuojn. Ili estas malpli ol herbo.
- Helena** Ho, ĉesu! Sendu ilin almenaŭ for!
- Domin** Marius, Sulla, vi povas foriri.
SULLA kaj MARIUS foriras
- Helena** Ili estas terruraj! Estas abomene, kion vi
faras!
- Domin** Kial abomene?
- Helena** Mi ne scias. Kial — kial vi donis al ŝi la no-
mon Sulla?
- Domin** Ĉu malbela nomo?
- Helena** Estas vira nomo. Sulla estis roma arme-
estro.

- Domin** Ho, ni pensis, ke Marius kaj Sulla estis geamantoj.
- Helena** Ne. Marius kaj Sulla estis armeestroj kaj kontraŭbatalis reciproke en la jaro — en la jaro — mi ne plu scias.
- Domin** Venu ĉi tien, al la fenestro. Kion vi vidas?
- Helena** Masonistojn.
- Domin** Tio estas Robotoj. Ĉiuj niaj laboristoj estas Robotoj. Kaj ĉi tie malsupre, ĉu vi vidas ion?
- Helena** Ian oficejon.
- Domin** La kalkulejo. Kaj en ĝi —
- Helena** — plene da oficistoj.
- Domin** Estas Robotoj. Ĉiuj niaj oficistoj estas Robotoj. Ĝis kiam vi vidas la uzinon — *samtempe eksonas la uzinaj fajfiloj kaj sirenoj*
- Domin** Tagmezo. Robotoj ne scias, kiam ĉesi la laboron. Je la dua mi montros al vi knedujojn.
- Helena** Kiajn knedujojn?
- Domin** *sekvoĉe*
Knedujojn por pasto. En ĉiu oni knedas samtempe materion por mil Robotoj. Poste tinojn por hepatoj, cerboj kaj tiel plu. Pos-

te vi vidos la uzinon por ostoj. Poste mi montros al vi la ŝpinejon.

Helena

Kian ŝpinejon?

Domin

Nervoŝpinejon. Vejnoŝpinejon. Ŝpinejon, kie oni fabrikas samtempe tutajn kilometrojn da faringoj. Poste estas la muntejo, kie oni kunigas ĉion, sciu, kiel aŭtomobilojn. Ĉiu laboristo aligas nur unu parton kaj aŭtomate tio kuras pluen al la dua, tria, senfine. Tio estas la plej interesa spektaklo. Poste estas la sekigejo kaj magazenoj, kie laboras la freŝaj fabrikaĵoj.

Helena

Pro Dio, ĉu tuj ili devas labori?

Domin

Pardonu! Ili laboras tiel, kiel laboras nova meblaro. Ili kutimiĝas al la ekzistado. Ili kvazaŭ kunkreskas interne, aŭ io alia fariĝas kun ili. Multo nova eĉ kreskas en ili. Sciu, ni devas lasi iom da spaco por natura evoluo. Kaj dume oni finpretigas la fabrikaĵojn.

Helena

Kion tio signifas?

Domin

La samon, kiel ĉe la homoj "la lernejo". Ili lernas paroli, skribi kaj kalkuli. Ili posedas ja miregindan memoron. Se vi tralegus al ili dudekvoluman enciklopedion, ili ĉion ripetos al vi. Ion novan ili neniam elpen-

sos. Ili tute bone povus instrui en universitatoj. Poste oni klasigas ilin laŭ specoj kaj dissendas. Ĉiutage dek kvin mil pecojn, ne enkalkulite ĉiamam percenton da difektitaj, kiujn oni ĵetas en pistmaŝinon ... kaj tiel plu kaj tiel plu.

Helena Ĉu vi koleras je mi?

Domin Aĥ, gardu Dio! Mi pensas nur, ke ... ke ni povus paroli pri aliaj aferoj. Ni estas ĉi tie nur kelkaj inter centmiloj da Robotoj, kaj neniun virino. Ni parolas nur pri fabrikado, la tutan tagon, ĉiun tagon. — Ni estas kva-zaŭ kondamnitaj, fraŭlino Glory.

Helena Mi ege bedaŭras, ke mi diris, ke — ke — ke vi mensogas —

pordofrapo

Domin Eniru, junuloj!

de maldekstre eniras inĝ. FABRY, d-ro GALL, d-ro HALLEMEIER, konstruestro ALQUIST

D-ro Gall Pardonu, ĉu ni ne ĝenas?

Domin Venu ĉi tien. Fraŭlino Glory, tio estas Alquist, Fabry, Gall, Hallemeier. Filino de la prezidanto Glory.

Helena *embarase*

Bonan tagon.

Fabry Ni ne havis eĉ ideon —

- D-ro Gall** Senfine honorataj —
- Alquist** Estu bonvena, fraŭlino Glory.
de dekstre enfalas BUSMAN
- Busman** Halo, kion vi havas ĉi tie?
- Domin** Ĉi tien, Busman. Tio estas nia Busman, fraŭlino. La filino de la prezidanto Glory.
- Helena** Estas agrable por mi.
- Busman** Mia Dio, kia gloro! Fraŭlino Glory, ĉu vi permesas, ke ni kablu al la ĵurnaloj, ke vi bonvolis honori nin per via vizito —?
- Helena** Ne, ne, mi petas vin!
- Domin** Mi petas, fraŭlino, sidiĝu.
- Busman** *altiras apogseĝojn*
Bonvolu —
- D-ro Gall** Mi petas —
- Fabry** Pardonu —
- Alquist** Fraŭlino Glory, kiel vi vojaĝis?
- D-ro Gall** Ĉu vi restos pli longe ĉe ni?
- Fabry** Kion vi diras pri la uzino, fraŭlino Glory?
- Hallemeier** Ĉu vi alvenis sur Amelio?
- Domin** Silentu, lasu paroli fraŭlinon Glory.
- Helena** *al Domin*
Pri kio mi parolu kun ili?
- Domin** *mirigite*
Pri kio vi volas.

- Helena** Ĉu mi parolu — ĉu vi permesas, ke mi parolu tute malkaŝe?
- Domin** Nu kompreneble.
- Helena** *hezitas, poste malespere kuraĝiĝinte*
Diru, ĉu neniam turmentas vin, kiel oni traktas vin?
- Fabry** Kiu, mi petas?
- Helena** Ĉiuj homoj.
ĉiuj konsternite rigardas reciproke unu la alian
- Alquist** Ĉu nin?
- D-ro Gall** Kial vi pensas?
- Hallemeier** Mil tondroj!
- Busman** Aĥ, gardu Dio, fraŭlino Glory!
- Helena** Ĉu vi ne sentas, ke vi povus ekzisti pli bone?
- D-ro Gall** Tio estas diskutinda, fraŭlino. Kiel vi pensas tion?
- Helena** Mi pensas, ke —
eksplodas
— ke tio estas abomenega! Ke tio estas terura!
ŝi ekstaras
Tuta Eŭropo parolas pri tio, kio okazas ĉi tie kun vi. Tial mi alvenis, por vidi tion, kaj

tio estas miloble pli malbona, ol iu pensas!
Kiel vi kapablas toleri tion?

Alquist Kion toleri?

Helena Vian situacion. Pro Dio, vi estas ja homoj,
kiel ni, kiel la tuta Eŭropo, kiel la tuta
mondo! Estas skandale, estas malinde, kiel
vi vivas!

Busman Pro Dio, fraŭlino!

Fabry Ne, junuloj, iomete ŝi estas prava. Ni vivas
ĉi tie efektive kiel Indianoj.

Helena Pli malbone ol Indianoj! Ĉu vi permesas,
ho, ĉu vi permesas, ke mi alparolu vin fra-
toj?

Busman Nu, mia Dio, kial ne?

Helena Fratoj, mi ne alvenis kiel filino de la pre-
zidanto. Mi alvenis en nomo de la Ligo de
Humaneco. Fratoj, la Ligo de Humaneco
havas jam pli ol ducent mil anojn. Ducent
mil homoj staras post vi kaj disponigas al
vi sian helpon.

Busman Ducent mil homoj, verdire, tio estas jam
rimarkinda, tio estas tute bela.

Fabry Mi diras ĉiam al vi, nenio superas malno-
van Eŭropon. Vidu, ĝi ne forgesis nin. Ĝi
disponigas al ni helpon.

D-ro Gall Kian helpon? Ĉu teatron?

- Hallemeier** Ĉu orkestron?
- Helena** Pli ol tio.
- Alquist** Ĉu vin mem?
- Helena** Ho, kio min koncernas! Mi restos, dum estos necese.
- Busman** Mia Dio, kia ĝojo!
- Alquist** Domin, mi iros prepari por la fraŭlino la plej bonan ĉambron.
- Domin** Atendu momenton. Mi timas, ke — ke fraŭlino Glory ankoraŭ ne finparolis.
- Helena** Ne, mi ne finparolis, se vi ne fermos al mi perforte la buŝon.
- D-ro Gall** Harry, ne kuraĝu!
- Helena** Mi dankas vin. Mi sciis, ke vi defendos min.
- Domin** Pardonu, fraŭlino Glory. Ĉu vi estas konvinkita, ke vi parolas kun Robotoj?
- Helena** *ekembarasiĝas*
Kun kiu alia?
- Domin** Mi bedaŭras. Ĉi tiuj sinjoroj estas efektive homoj kiel vi. Kiel la tuta Eŭropo.
- Helena** *al la ceteraj*
Ĉu vi ne estas Robotoj?
- Busman** *ridegas*
Dio gardu!

Hallemeier *dignoplene*

Fi, Robotoj!

G-ro Gall *ridas*

Ni dankas kore!

Helena Sed ... tio ne estas ebla!

Fabry Je mia honoro, fraŭlino, ni ne estas Robotoj.

Helena *al Domin*

Kial do vi diris al mi, ke ĉiuj viaj oficistoj estas Robotoj?

Domin Jes, la oficistoj. Sed la direktoroj ne. Permesu, fraŭlino Glory: inĝeniero Fabry, ĝenerala teknika direktoro de Rossumaj Universal-Robotoj. Doktoro Gall, estro de la fiziologia kaj esplora departemento. Doktoro Hallemeier, estro de la instituto por psikologio kaj eduko de Robotoj. Konsulo Busman, ĝenerala komerca direktoro kaj konstruisto Alquist, konstruestro de Rossumaj Universal-Robotoj.

Helena Pardonu, sinjoroj, ke — ke — — Estas terrure! Kion mi faris?

Alquist Aĥ, gardu Dio, fraŭlino Glory. Mi petas, sidiĝu.

- Helena** *eksidas*
Mi estas malsaĝa knabino. Nun — nun vi sendos min per la unua ŝipo reen.
- D-ro Gall** Por nenio en la mondo, fraŭlino. Kial ni sendus vin for?
- Helena** Ĉar vi jam scias — ĉar — ĉar mi ribeligus Robotojn kontraŭ vin.
- Domin** Kara fraŭlino Glory, ĉi tie estis jam centoj da savistoj kaj profetoj. Ĉiu ŝipo alveturigas iun. Misiistojn, anarkistojn, Savarmeon, ĉion eblan. Estas tre mirinde, kiom da eklezioj kaj frenezuloj estas sur la mondo.
- Helena** Kaj ĉu vi permesas, ke ili parolu al Robotoj?
- Domin** Kial ne? Ĝis nun ĉiuj lasis tion. Robotoj memoras ĉion, sed plu nenio. Ili ja eĉ ne ridas pri tio, kion la homoj parolas. Efektive, tio estas vere nekredinda. Se interesas vin, kara fraŭlino, mi kondukos vin en la magazenon de Robotoj. Estas tie eble tricent miloj da ili.
- Busman** Tricent kvardek sep mil.
- Domin** Bone. Vi povas alparoli ilin kiel vi volas. Vi povas tralegi al ili la biblion, logaritmojn, aŭ kio plaĉas al vi. Vi povas prediki al ili eĉ pri homaj rajtoj.

- Helena** Ho, mi pensas, ke ... se oni montrus al ili iom da amo —
- Fabry** Ne eble, fraŭlino Glory. Nenio estas al la homo pli fremda ol Roboto.
- Helena** Kial do vi produktas ilin?
- Busman** *ridas*
Hahaha, tio estas bona! Kial oni produktas Robotojn!
- Fabry** Por laboro, fraŭlino. Unu Roboto anstataŭas du kaj duonan laboriston. Homa maŝino, fraŭlino Glory, estis tro neperfekta. Fine oni devis tamen forigi ĝin.
- Busman** Ĝi estis tro multekosta.
- Fabry** Ĝi estis malmulte produktema. Por moderna tekniko ĝi ne plu povis sufiĉi. Kaj due — due — estas granda progreso, ke ... pardonu.
- Helena** Kion?
- Fabry** Mi petas pardonon. Estas granda progreso naski per maŝino. Tio estas pli facila kaj pli rapida. Ĉiu plirapidigo estas progreso, fraŭlino. La naturo ne havis eĉ ideon pri moderna rapideco de laboro. La tuta infanaĝo estas de teknika vidpunkto pura sensencaĵo. Vere perdita tempo. Ne daŭri-

gebla malŝparo de tempo, fraŭlino Glory.
Kaj trie —

Helena Ho, ĉesu!

Fabry Laŭ via plaĉo. Permesu, kion do intencas
verdire tiu via Ligo — Ligo — Ligo de Hu-
maneco?

Helena Ĝi speciale — speciale celas defendi Robo-
tojn kaj — kaj — garantii al ili — bonan
farton.

Fabry Tio ne estas malbona celo. La maŝinoj de-
vas esti bone prizorgataj. Je mia animo, tio
estas laŭdinda. Mi ne ŝatas difektitajn
aĵojn. Mi petas vin, fraŭlino Glory, enskri-
bu nin ĉiujn kiel subtenantojn, kiel ordina-
rajn, kiel fondantajn anojn de tiu via Ligo!

Helena Ne, vi ne komprenas min! Ni volas — pre-
cipe — ni volas liberigi Robotojn!

Hallemeier Kiamaniere, mi petas vin?

Helena Oni traktu ilin ... traktu ilin ... kiel ho-
mojn.

Hallemeier Aha! Ĉu ili eble voĉdonu? Ĉu ili eble eĉ
ricevu salajron?

Helena Kompreneble, ke jes!

Hallemeier Ni rigardu! Kaj kion ili farus kun ĝi, mi
petas vin?

Helena Ili aĉetus ... kion ili bezonas kio ĝojigus ilin.

Hallemeier Tio estas tre bela, fraŭlino; sed Robotojn nenio ĝojigas. Mil tondroj, kion ili aĉetu? Vi povas ilin nutri per ananasoj, per pajlo, per kio vi volas; al ili tio estas egala, ili havas tute nenian gustosenton. Ili interesas sin pri nenio, fraŭlino Glory. Diablo, diablo, neniu vidis ankoraŭ, ke Roboto estus ekridetinta.

Helena Kial ... kial ... kial vi ne faras ilin pli feliĉaj?

Hallemeier Ne eble, fraŭlino Glory. Ili estas nur Robotoj. Sen propra volo. Sen pasioj. Sen historio. Sen animo.

Helena Ĉu sen amo kaj obstino?

Hallemeier Kompreneble. Robotoj amas nenion, eĉ ne sin mem. Kaj ĉu obstino? Mi ne scias; nur malofte, nur de tempo al tempo —

Helena Kio?

Hallemeier Verdire nenio. Iufoje ili kvazaŭ freneziĝas. Io kvazaŭ epilepsio, sciu! Oni nomas ĝin la spasma de Robotoj. Subite iu forĵetegas ĉion, kion li tenas en la mano, li staras, grincas per la dentoj — kaj devas esti ĵetita en pistmaŝinon. Verŝajne difekto de organismo.

- Domin** Fabrika difekto.
- Helena** Ne, ne, tio estas la animo!
- Fabry** Ĉu vi pensas, ke la animo komenciĝas per dentogrincado?
- Domin** Tion oni forigos, fraŭlino Glory. Doktoro Gall ĵus faras iajn eksperimentojn —
- D-ro Gall** Kun tio ĉi ne, Domin; nun mi fabrikas nervojn por doloro.
- Helena** Nervojn por doloro?
- D-ro Gall** Jes. Robotoj preskaŭ ne sentas korp doloron. Komprenu, mortinta juna Rossum tro limigis la nervan sistemon. Tio ne montris sin taŭga: oni devas ilin igi dolorsentemaj.
- Helena** Kial — kial — se vi ne donas al ili animon, kial vi volas doni al ili doloron?
- D-ro Gall** Pro industriaj kaŭzoj, fraŭlino Glory. Roboto kelkfoje difektas sin mem, ĉar tio ne doloras ĝin; ĝi enigas la manon en maŝinon, ĝi rompas sian fingron, ĝi frakasas la kapon, tio estas al ĝi egala. Ni devas doni doloron al ili; tio estas aŭtomata ŝirmilo kontraŭ lezo.
- Helena** Ĉu ili estos pli feliĉaj, se ili sentos doloron?
- D-ro Gall** Male; sed ili estos teknike pli perfektaj.
- Helena** Kial vi ne kreas animon al ili?
- D-ro Gall** Tion ni ne kapablas.

- Fabry** Tio ne estas en nia intereso.
- Busman** Tio plikarigus la fabrikadon. Pro Dio, bela sinjorino, ni ja faras tion tiel malkare! Vestita peco po cent dudek dolaroj, kaj antaŭ dek kvin jaroj ĝi kostis dek mil! — Antaŭ kvin jaroj ni aĉetadis por ili vestaron; hodiaŭ ni posedas proprajn teksejojn kaj ni ankaŭ eksportas ŝtofojn kvinoble pli malkare ol aliaj uzinoj. Mi petas vin, fraŭlino Glory, kiom vi pagas por unu metro da tolo?
- Helena** Mi ne scias — — efektive — — — mi forgesis.
- Busman** Mia Dio, kaj vi volas fondi Ligon de Humaneco! Ĝi kostas jam nur la trionon, fraŭlino; ĉiuj prezoj malaltiĝis ĝis la triono kaj ili malaltiĝos pli, pli, pli ĝis — tiel ...
li montras
He?
- Helena** Mi ne komprenas.
- Busman** Pro Dio, fraŭlino, tio signifas, ke la laboro perdis je valoro! Roboto kostas ja eĉ kun nutraĵo por unu horo tri kvaronojn da cendeto! Tio estas amuza, fraŭlino. Ĉiuj uzinoj kreas kiel glanoj, aŭ ili rapide aĉetas Robotojn, por malkarigi la fabrikadon.

- Helena** Jes, kaj ili elĵetas la laboristojn sur pavimon.
- Busman** *ridas*
Haha, kompreneble! Sed ni, mia bona Dio, ni ĵetis dume kvin cent mil tropikajn Robotojn sur la argentinajn pampojn, por ke ili kulturu tritikon. Estu tiel afabla, kiom kostas ĉe vi funto da pano?
- Helena** Mi havas eĉ ne ideon.
- Busman** Do vidu; nun ĝi kostas du cendetojn, en tiu via bona malnova Eŭropo; sed tio estas nia pano, ĉu vi komprenas? Du cendetoj por funto da pano; kaj la Ligo de Humaneco havas pri tio eĉ ne ideon!
- li ridas*
Haha, fraŭlino Glory, vi ne scias, kio estas tro multekosta pantranĉaĵo. Pro kulturo kaj tiel plu. Sed en kvin jaroj, nu, do vetu! Kion?
- Helena**
- Busman** Ke post kvin jaroj ĉiuj prezoj estos nula entjero, unu decimalo. Karuloj, post kvin jaroj ni dronos en tritiko kaj en ĉio ebla.
- Alquist** Jes, kaj ĉiuj laboristoj de la mondo estos sen laboro.

- Domin** *ekstaras*
 Estos, Alquist. Estos, fraŭlino Glory. Sed ĝis dek jaroj Rossumaj Universal- Robotoj produktos tiom da tritiko, tiom da ŝtofoj, tiom da ĉio, ke ni diros: la komercaĵoj ne havas plu valoron. Nun prenu ĉiu, kiom li bezonas. Ne ekzistos mizero. Jes, ili estos sen laboro. Sed tiam estos jam entute neniu laboro. Ĉion faros vivaj maŝinoj. La homo farados nur tion, kion li ŝatos. Li vivos nur por tio, ke li pliperfektigu.
- Helena** *ekstaras*
 Ĉu estos tiel?
- Domin** Estos. Ne povas esti alie. Pli frue eble okazos teruraj aferoj, fraŭlino Glory. Tio estas simple neevitebla. Sed poste ĉesos la servado de homo al homo kaj la sklaveco de homo por materio. Neniu plu pagos la pannon per vivo aŭ per malamo. Vi ne plu estas laboristo, vi ne plu estas skribisto; vi ne plu minas karbon kaj vi ne staras ĉe fremda maŝino. Vi ne plu disigados vian animon en laboro, kiun vi malbenas!
- Alquist** Domin, Domin! Tio, kion vi diras, aspektas tro kiel paradizo. Domin, estis io bona en servado kaj io granda en humiligo. Ho,

Harry, estis — mi ne scias kia — virto en laboro kaj laceco.

Domin Eble estis. Sed ni ne povas kalkuli kun tio, kio perdiĝos, se ni aliformas la mondon komencante de Adamo. Adamo, Adamo! Vi ne plu manĝos vian panon kun ŝvitanta vizaĝo; vi ne plu sentos malsaton kaj soifon, laciĝon kaj humiligon; vi revenos paradizon, kie nutris vin la mano de la Sinjoro. Vi estos libera kaj suverena; vi ne havos alian taskon, alian laboron, alian zorgon, ol pliperfektigi vin mem. Vi estos estro de la kreaĵo.

Busman Amen.

Fabry Fariĝu tiel.

Helena Vi konfuzis min. Mi estas naivega knabino. Mi volus — mi volus kredi tion.

D-ro Gall Vi estas pli juna ol ni, fraŭlino Glory. Vi ĝisvivos ĉion.

Hallemeier Jes. Mi pensas, ke fraŭlino Glory povus lunĉi kun ni.

D-ro Gall Kompreneble! Domin, petu en nomo de ni ĉiuj ...

Domin Fraŭlino Glory, honorigu nin.

Helena Sed tio do — kiel mi povus?

Fabry Por Ligo de Humaneco, fraŭlino.

- Busman** Kaj je ĝia honoro.
- Helena** Ho, ĉiuokaze — eble —
- Fabry** Do vivu! Fraŭlino Glory, pardonu por kvin minutoj.
- D-ro Gall** Pardonu.
- Busman** Pro Dio, mi devas kabli —
- Hallemeier** Diablo, kaj mi forgesis —
Ĉiuj, krom Domin kaj Helena, rapidas eksteren.
- Helena** Kial ĉiuj foriras?
- Domin** Kuiru, fraŭlino Glory.
- Helena** Kion kuiri?
- Domin** Lunĉon, fraŭlino Glory. Por ni kuiras Robotoj kaj — kaj — ĉar ili havas nenian gustosenton, tio ne estas tute — Hallemeier rostas ja bonege. Kaj Gall scipovas ian saŭcon kaj Busman estas sperta pri omleto —
- Helena** Pro Dio, tio estos festeno! Kaj kion scipovas sinjoro — konstruisto —
- Domin** Ĉu Alquist? Nenion. Li nur ordigos la tablon kaj — kaj Fabry havigos iom da fruktoj. Tre modesta kuiri, fraŭlino Glory.
- Helena** Mi volis demandi vin —

- Domin** Ankaŭ mi volus pri io demandi vin.
li metas sian horloĝon sur la tablon
Kvin minutoj da tempo.
- Helena** Pri kio demandi?
- Domin** Pardonu, vi demandis pli frue.
- Helena** Eble la demando estas malsaĝa; sed kial vi fabrikas virinajn Robotojn, se — se —
- Domin** — se ĉe ili, hm, se por ili la sekso estas sen signifo?
- Helena** Jes.
- Domin** Estas iam tia mendokondiĉo, sciu! Servistinoj, vendistinoj, skribistinoj — la homoj estas kutimiĝintaj.
- Helena** Kaj — kaj diru, ĉu estas Robotoj — kaj Robotinoj — reciproke — absolute —
- Domin** Absolute indiferentaj, kara fraŭlino. Estas eĉ ne signo je ia inklino.
- Helena** Ho, tio estas — terrura!
- Domin** Kial?
- Helena** Tio estas — estas — tiel nenatura! Oni eĉ ne scias, ĉu oni pro tio sentu naŭzon kontraŭ ili, aŭ — enŭiu ilin — aŭ eble ...
- Domin** — bedaŭru ilin.
- Helena** Tion plej eble. — Ne, ĉesu! Kion vi volis demandi?

- Domin** Mi volonte demandus, fraŭlino Glory, ĉu vi volus min.
- Helena** Kiel voli vin?
- Domin** Kiel edzon.
- Helena** Ne! Kiamaniere venis tia ideo al vi?
- Domin** *rigardas la horloĝon*
Ankoraŭ tri minutoj. Se vi ne edziniĝos kun mi, vi estos devigata edziniĝi kun iu el la kvin ceteraj.
- Helena** Dio gardu! Kial mi edziniĝu kun li?
- Domin** Ĉar ĉiuj laŭvice petos vin pri tio.
- Helena** Kiamaniere ili povus kuraĝi?
- Domin** Mi tre bedaŭras, fraŭlino Glory. Ŝajnas, ke ili estas vin ekamintaj.
- Helena** Mi petas vin, ili ne faru tion! Mi — mi tuj forveturos!
- Domin** Helena, vi ne tiel malgajigu ilin.
- Helena** Sed mi ja — mi ja ne povas edziniĝi kun ĉiuj ses!
- Domin** Ne, sed almenaŭ kun unu. Se vi ne volas kun mi, do kun Fabry.
- Helena** Mi ne volas!
- Domin** Kun doktoro Gall.
- Helena** Ne, ne, silentu! Mi volas neniun.
- Domin** Ankoraŭ du minutoj.

- Helena** Tio estas terrura! Edziniĝu kun iu Robotino.
- Domin** Ŝi ne estas virino.
- Helena** Ho, nur tio mankas al vi! Mi pensas, ke — ke vi edziniĝus kun ĉiu, kiu alvenas ĉi tien.
- Domin** Estis ĉi tie multe da ili, Helena.
- Helena** Ĉu junaj?
- Domin** Junaj.
- Helena** Kial vi ne edziniĝis kun iu?
- Domin** Ĉar mi ne perdis la kapon. Nur hodiaŭ. Tuj post kiam vi demetis la vualon.
- Helena** — Mi scias.
- Domin** Ankoraŭ unu minuto.
- Helena** Sed mi ne volas, pro Dio!
- Domin** *metas ambaŭ manojn sur ŝiajn ŝultrojn*
Ankoraŭ unu minuto. Aŭ vi diros al mi senpere ion terure malbonan, kaj poste mi lasos vin. Aŭ — aŭ —
- Helena** Vi estas maldelikatulo!
- Domin** Tio estas nenio. Viro devas esti iomete maldelikata. Tio decas.
- Helena** Vi estas frenezulo!
- Domin** La homo devas esti iom freneza, Helena. Tio estas ĉe li la plej bona.
- Helena** Vi estas — vi estas — aĥ mia Dio!
- Domin** Do vidu! Ĉu prete?

Helena Ne, ne! Mi petas vin, lasu min! Vi ja dis-
prrrremos min!

Domin La lastan vorton, Helena!

Helena *defendas sin*

Por nenio en la mondo — Do Harry!

pordofrapo

Domin *ellasis ŝin*

Eniru!

eniras BUSMAN, D-roj GALL kaj HALLEMEIER vestitaj per kuirejaj antaŭtukoj, FABRY kun bukedo kaj ALQUIST kun buŝtuko sub la brako

Domin Ĉu vi jam estas pretaj?

Busman *solene*

Jes.

Domin Ni ankaŭ.

kurteno

UNUA AKTO

La salono de Helena. Maldekstre tapetpordo kaj pordo al muziksalono, dekstre pordo al la dormoĉambro de Helena. Meze fenestroj al la maro kaj haveno. Tualettablo kun spegulo kaj kun filigranaĵoj, tablo, sofo kaj apogseĝoj, komodo, skribtablo kun staranta elektra tampo, dekstre kameno ankaŭ kun starantaj lampoj. La tuta salono inklusive detalaĵoj havas modernan kaj tute virinan aspekton.

DOMIN, FABRY, HALLEMEIER eniras senbrue de maldekstre kaj portas plenbrakojn da bukedoj kaj florpotoj

Fabry Kien ni donos ĉion ĉi?

Hallemeier Uf!

demetas sian ŝarĝon kaj benas per granda krucosigno la pordon dekstre.

Dormu, dormu! Kiu dormas, scias almenaŭ pri nenio

Domin Ŝi tute ne scias.

- Fabry** *enigas bukedojn en florvazojn*
Se almenaŭ hodiaŭ la afero ne malkaŝi-
ĝus —
- Hallemeier** *ordigas la florojn*
Je diablo, ne parolu pri tio! Rigardu, Harry,
ĉi tio estas belega ciklameno, ĉu ne? Nova
speco, mia lasta — ciklameno Helena.
- Domin** *rigardas el la fenestro*
Neniu ŝipo, neniŭ ŝipo — knaboj, tio estas
jam malespera.
- Hallemeier** Silentu! Se ŝi aŭdus vin!
- Domin** Ŝi ne havas eĉ ideon.
Li oscedas febre.
Feliĉe, ke almenaŭ "Ultimus" ĝustatempe
alvenis.
- Fabry** *lasas la florojn*
Ĉu vi pensas, ke jam hodiaŭ —?
- Domin** Mi ne scias. — Kiel belaj estas la floroj!
- Hallemeier** *alproksimiĝas al li*
Tio estas novaj primoloj, ĉu vi komprenas?
Kaj ĉi tio estas mia nova jasmeno. Mil
tondroj, mi estas sur la sojlo de florparadi-
zo. Mi trovis miregindan rapidigon, amiko!
Luksegaj variaĵoj! Venontan jaron mi faros
miraklojn en la floraro!

- Domin** *turnas sin*
Kion, venontan jaron?
- Fabry** Almenaŭ, se ni scius, kio okazas en Haver—
- Domin** Silentu.
- Voĉo de Helena** *de dekstre*
Nana!
- Domin** For de ĉi tie!
Ĉiuj senbrue eliras tra la tapetpordo. Tra la ĉefpordo eniras de maldekstre NANA
- Nana** *ordigas la ĉambron*
Kanjloj malbelaĉaj! Paganuoj! Dio ne punu min, sed mi ilin —
- Helena** *dorsturnite en la pordo*
Nana, venu min butonumi!
- Nana** Nu tuj, nu tuj.
butonumante la veston al Helena
Dio en la ĉielo, tio estas bestaĉaro!
- Helena** Ĉu Robotoj?
- Nana** Fi, eĉ nomi ilin mi ne volas.
- Helena** Kio okazis?
- Nana** Ree tio atakis iun ĉe ni. Li ekbategas statuojn kaj bildojn, grincas per la dentoj, ŝaŭmon ĉe la buŝego, — tute frenezaĉa, brr!
Ĝi estas ja pli aĉa ol besto.
- Helena** Kiun tio atakis?

- Nana** Tion — tion — ĝi ja eĉ ne havas kristanan nomon! Tion el la biblioteko.
- Helena** Radiuson?
- Nana** Ĝuste tion. Pro ĉiuj sanktuloj, tio naŭzas min! Eĉ araneo ne naŭzas min tiel, kiel tiuj paganoj.
- Helena** Do Nana, ĉu vi ne kompatas ilin?
- Nana** Nu, vi sentas ja ankaŭ naŭzon kontraŭ ili. Kial do vi kunveturigis min ĉi tien? Kial do devas neniu el ili eĉ nur ektuŝi vin?
- Helena** Mi ne sentas naŭzon, je mia animo, Nana. Mi bedaŭregas ilin!
- Nana** Vi sentas naŭzon. Ĉiu homo devas senti naŭzon kontraŭ ili. Eĉ la hundo ja sentas naŭzon, eĉ pecon da viando ĝi ne prenas de ili; ĝi kuntiras la voston inter la piedojn kaj hurlas, kiam ĝi flaras tiujn nehomojn, fi.
- Helena** Hundo ne havas intelekton.
- Nana** Ĝi estas pli bona ol ili, Helena. Ĝi scias bone, ke ĝi estas io pli kaj ke ĝi estas de Dio. Eĉ ĉevalo ja malkvietiĝas renkontante tian paganon. Ĝi ja eĉ ne havas idaĉojn, kaj eĉ hundo havas idojn kaj ĉiu havas idojn —
- Helena** Mi petas vin, Nana, butonumu!

- Nana** Nu tuj. Mi diras, tio estas kontraŭ la Disinjoro, tio estas diabla inspiro, fabriki tiujn timigilojn per maŝino. Tio estas blasfemado kontraŭ la Kreinto,
ŝi levas la manon
tio estas ofendo de la Sinjoro, kiu kreis nin **laŭ sia bildo**, Helena. Kaj vi profanis la bildon de Dio. Pro tio venos terurega puno de la ĉielo, memoru tion, terurega puno!
- Helena** Kio bonodoras ĉi tie?
- Nana** Floroj. La sinjoro donis ilin ĉi tien.
- Helena** Ne, kiel belaj ili estas! Nana, rigardu! Kio estas hodiaŭ!
- Nana** Mi ne scias. Sed estus ĝuste tiel, kiel se okazus la detruo de la mondo.
ekfrapo
- Helena** Ĉu Harry?
eniras DOMIN
- Helena** Harry, kio estas hodiaŭ?
- Domin** Divenu!
- Helena** Ĉu mia nomtago? Ne! La naskiĝtago!
- Domin** Io pli bona.
- Helena** Mi ne scias — diru tuj!
- Domin** Hodiaŭ estas dek jaroj, de post kiam vi alvenis ĉi tien.

- Helena** Ĉu jam dek jaroj? Ĝuste hodiaŭ? — Nana, mi petas vin —
- Nana** Nu mi ja jam iras!
ŝi foriras dekstren
- Helena** *kisas Dominon*
Por tio, ke vi memoris tion.
- Domin** Mi hontas, Helena. Mi ne memoris.
- Helena** Tamen —
- Domin** Tion memoris ili.
- Helena** Kiu?
- Domin** Busman, Hallemeier, ĉiuj. Enigu la manon ĉi tie en la poŝon, ĉu vi volas?
- Helena** *enpoŝigas la manon*
Kio estas tio?
ŝi elpoŝigas ujon kaj malfermas ĝin
Perloj! Tuta koliero! Harry, ĉu tio estas por mi?
- Domin** De Busman, knabino.
- Helena** Sed — tion ni ne povas akcepti, ĉu ne?
- Domin** Ni povas. Enigu la manon en la alian poŝon.
- Helena** Do!
ŝi eltiras el lia poŝo revolveron
Kio estas tio ĉi?

- Domin** Permesu!
li reprenas la revolveron el ŝia mano kaj kaŝas ĝin
- Tio ne estas tio. Enigu ree.
- Helena** Aĥ, Harry — kial vi portas revolveron ĉe vi?
- Domin** Sen intenco, nur hazarde.
- Helena** Tion vi neniam portis!
- Domin** Ne, vi estas prava. Do, ĉi tie estas la poŝo.
- Helena** *enpoŝigas la manon*
Skatoletto!
ŝi malfermas ĝin
Kameo! Tio estas ja — Harry, tio estas **gre-ka** kameo.
- Domin** Ŝajnas. Fabry almenaŭ asertas tion.
- Helena** Fabry? Ĉu Fabry donacas tion al mi?
- Domin** Certe.
li malfermas la pordon maldekstre
Kaj jen! Helena, venu rigardi!
- Helena** *en la pordo*
Mia Dio, tio estas bela!
ŝi kuras pluen
Mi frenezigos pro ĝojo! Ĉu tio estas de vi?
- Domin** *staras en la pordo*
Ne, de Alquist. Kaj tie —

- Helena** De Gall!
ŝi aperas en la pordo
Ho, Harry, mi preskaŭ hontas, ke mi estas tiel feliĉa.
- Domin** Venu ĉi tien. Ĉi tion alportis al vi Halle-meier.
- Helena** Ĉu tiujn belajn florojn?
- Domin** Jen! Tio estas nova speco, ciklameno Helena. Honore al vi li estis kulturinta ĝin. Ĝi estas bela, kiel vi.
- Helena** Harry, kial — kial ĉiuj ...
- Domin** Ili **treege** ŝatas vin. Kaj mi, hm. Mi timas, ke mia donaceto estas iomete — rigardu el la fenestro.
- Helena** Kien?
- Domin** En la havenon.
- Helena** Estas tie ... ia ... nova ŝipo.
- Domin** Tio estas via ŝipo.
- Helena** Mia? Harry, ĝi estas **kanona** ŝipo!
- Domin** Ĉu kanona? Aĥ, kia ideo! Tio estas nur iom granda, fortika ŝipo, sciu.
- Helena** Jes, sed kun kanonoj!
- Domin** Kompreneble, kun kelkaj kanonoj — vi vojaĝos kiel reĝino, Helena.
- Helena** Kion signifas tio? Ĉu io okazas?

- Domin** Gardu Dio! Mi petas, surmetu prove la perlojn.
li sidiĝas
- Helena** Harry, ĉu alvenis iuj malbonaj sciigoj?
- Domin** Kontraŭe, jam tutan semajnon ne venis ia poŝto.
- Helena** Ĉu nek depeŝoj?
- Domin** Nek depeŝoj.
- Helena** Kion tio signifas?
- Domin** Nenion. Por ni feriojn. Belega tempo. Ĉiu el ni sidas en la oficejo, piedojn sur la tablo kaj dormetadas — neniuj poŝtaĵoj, neniuj telegramoj —
li streĉas sin
Fff-festena tago!
- Helena** *eksidas apud li*
Hodiaŭ vi restos ĉe mi, ĉu ne? Diru!
- Domin** Nepre. Eble, ke jes. Eble, ni vidos.
Li prenas ŝian manon.
Do hodiaŭ estas dek jaroj, ĉu vi memoras? — Fraŭlino Glory, kia honoro por ni, ke vi alveturis!
- Helena** Ho, sinjoro centra direktoro, min tiel interesas via entrepreno!

- Domin** Pardonu, fraŭlino Glory, kvankam estas severe malpermesite — La fabrikado de artefaritaj homoj estas sekreta —
- Helena** Sed se petas juna, iom bela knabino —
- Domin** Nu kompreneble, fraŭlino Glory, por vi ni ne havas sekretojn.
- Helena** *subite serioze*
Ĉu nepre ne, Harry?
- Domin** Ne.
- Helena** *en la sama tono*
Sed mi avertas vin, sinjoro; tiu junulino intencas terruraĵojn.
- Domin** Pro Dio, fraŭlino Glory, kiajn do? Ĉu ŝi eble volas edziniĝi kun mi?
- Helena** Ne, ne, gardu Dio! Pri tio eĉ en songo ŝi ne pensis! Sed ŝi alvenis kun plano rribeligi viajn abomenajn Robotojn!
- Domin** *eksaltas*
Ribeligi Robotojn!
- Helena** *leviĝas*
Harry, kio estas al vi?
- Domin** *ridas*
Haha, fraŭlino Glory, vi sukcesis! Ribeligi Robotojn! Pli facile vi ribeligus ŝpinilojn aŭ plandonajlojn ol niajn Robotojn!
li sidiĝas

Sciu Helena, vi estis ĉarmega knabino; vi frenezigis nin ĉiujn.

Helena *sidiĝas apud li*

Ho, tiam vi ĉiuj tiel imponis al mi! Mi sentis min kvazaŭ knabineto, kiu erariris inter — inter —

Domin Inter kion, Helena?

Helena Inter grrrandegajn arbojn. Vi estis tiel certaj pri vi, tiel potencaj! Kaj vidu, Harry, dum tiuj dek jaroj neniam forlasis min tiu — — — tiu angoro, aŭ kiel mi ĝin nomus, kaj vi neniam ekdubis — eĉ ne, se ĉio malsukcesadis.

Domin Kio malsukcesadis?

Helena Viaj planoj, Harry. Kiam ekzemple la laboristoj ekribeladis kontraŭ Robotoj kaj disbatadis ilin, kaj kiam la homoj donis armilojn al Robotoj kontraŭ tiuj ribeloj kaj la Robotoj mortigis tiom da homoj — kaj kiam poste registaroj faris soldatojn el Robotoj kaj estis tiomaj militoj kaj ĉio tio, ĉu vere?

Domin *ekstaras kaj promenas*

Tion ni antaŭvidis, Helena. Komprenu, tio estas nur transiro — al novaj kondiĉoj.

- Helena** La tuta mondo adoradis vin —
ŝi ekstaras
Ho, Harry!
- Domin** Kion vi volas?
- Helena** *haltigas lin*
Fermu la uzinon kaj ni forveturu! Ni ĉiuj!
- Domin** Mi petas vin, kiamaniere tio rilatas?
- Helena** Mi ne scias. Diru, ĉu ni forveturos? Mi sentas **tian** angoron pro io.
- Domin** *ekprenas ŝin je la manoj*
Pro kio, Helena?
- Helena** Ho, mi ne scias! Kvazaŭ io falus sur nin kaj sur ĉion — neeviteble — mi petas vin, faru tion! Prenu nin ĉiujn for de ĉi tie! Ni trovos en la mondo lokon, kie neniu estas. Alquist konstruos domon al ni, ĉiuj edziĝos kaj havos idojn kaj poste ...
- Domin** Kion poste?
- Helena** Poste ni ekvivos de la komenco, Harry.
eksonoras telefono
- Domin** *elŝiras sin de Helena*
Pardonu ...
li prenas la aŭskultilon
Halo — jes — Kio? — Aha. Mi kuras jam.
li pendigas la aŭskultilon
Fabry vokas min.

- Helena** *preĝkunmetas la manojn*
Diru —
- Domin** Jes, kiam mi revenos. Adiaŭ, Helena!
li kuregas maldekstren
Ne iru eksteren!
- Helena** *sola*
Ho Dio, kio okazas? Nana! Nana, rapide!
- Nana** *eniras de dekstre*
No, kio ree?
- Helena** Nana, elserĉu la lastajn ĵurnalojn! Rrrapide!
de! En la dormoĉambro de la sinjoro!
- Nana** Nu tuj.
ŝi foriras maldekstren
- Helena** Kio okazas nur, pro Dio? Nenion, nenion li
diras al mi!
ŝi rigardas per lorno al la haveno
Estas milita ŝipo! Mia Dio, kial milita? Ili
enŝipigas ion — kaj tiel rapide! Kio okazis?
Estas nomo sur ĝi — "Ul-ti-mus". Kion
signifas: "Ultimus"?
- Nana** *revenas kun ĵurnalo*
Sur la planko li lasas kuŝi ĝin! Tiamaniere
premdifekti ĝin!
- Helena** *malfermas rapide la ĵurnalon*
Malnova, jam sep tagojn malnova! Nenio,
nenio en ĝi!

ŝi ellasas ĵurnalon

Nana *levas ĝin, elpoŝigas el la antaŭtuko grandajn okulvitrojn, sidiĝas kaj legas.*

Helena Io okazas, Nana! Mi sentas tian angoron! Kvazaŭ ĉio estus morta, eĉ la aero —

Nana *silabumas*

”Mi-li-to sur Bal-ka-no”. Aĥ Jesuo, ree dia puno! Nu tiu milito venos eĉ tien ĉi! Ĉu tio estas malproksime de ĉi tie?

Helena Malproksime. Ho, ne legu tion! Estas ĉiam la samo, ĉiam tiuj militoj —

Nana Ke ili ne okazu! Ĉu vi ne vendas seninterrompe milojn da miloj da tiuj paganoj kiel soldatojn? — — Ho, Sinjoro Kristo, tia aĉa malordego!

Helena Ne, ne legu! Mi volas nenion scii!

Nana *silabumas*

”Ro-bo-taj sol-dat-oj in-dul-gas ne-ni-un en kon-ke-ri-ta re-gi-o-no. I-li ma-sak-ili masakris pli ol sep cent mil ci-vil-ajn homojn —” Homojn, Helena!

Helena Ne eble! Montru —

ŝi kliniĝas al la ĵurnalo, ŝi legas

”Ili masakris pli ol sep cent mil civilajn homojn verŝajne laŭ ordono de la koman-

- danto. Ĉi tiu ago kontraŭ —” Do vidu,
Nana, tion ordonis al ili la homoj!
- Nana** Ĉi tie estas io plej dike presita. ”La-staj sci-
igoj. En Ha-ver fon-di-ĝis la u-nu-a ra-sa
or- or-or-ga-ni-za-ĵo de Ro-bo-toj.” —Tio
estas nenio. Tion mi ne komprenas. Kaj ĉi
tie, mia Dio, ree ia murdo! Pro Sinjoro Kri-
sto!
- Helena** Iru, Nana, forportu la ĵurnalon!
- Nana** Haltu, ĉi tie estas io granda. ”Po-pu-la-ci-
o”. Kio estas tio?
- Helena** Montru, tion mi ĉiam legas.
ŝi ekprenas la ĵurnalon
Ne, pripensu nur!
ŝi legas
”Dum la lasta semajno ree ne estis raporti-
te eĉ pri unu naskiĝo.”
ŝi ellasas ĵurnalon
- Nana** Kion tio devas signifi?
- Helena** Nana, homoj ĉesas naskiĝi.
- Nana** *kunmetante la okulvitrojn*
Do tio estas la fino. Estas fino kun ni.
- Helena** Mi petas vin, ne parolu tiel!
- Nana** Homoj ne plu naskiĝas. Tio estas puno, tio
estas puno! Dio vundis la virinojn per sen-
frukteco.

Helena *eksaltas*

Nana!

Nana *ekstaras*

Tio estas la detruo de la mondo. Pro diabla fierego vi kuraĝis kreadi kiel la Plejpotenculo. Tio estas sendieco kaj blasfemado, vi volas esti kiel Dioj. Kaj kiel Dio elpelis la homon el la paradizo, tiel li elpelos ĝin el la tuta mondo!

Helena Silentu, Nana, mi petegas vin! Ĉu mi malbonfaris al vi? Ĉu mi faris ion al tiu via kolera Dio?

Nana *kun granda gesto*

Ne blasfemi! — li scias bone, kial li ne donis idon al vi!

ŝi foriras maldekstren

Helena *ĉe la fenestro*

Kial li ne donis **al mi** — Mia Dio, ĉu mi estas kulpa pri tio? — —

ŝi malfermas la fenestron kaj vokas

Alquist, halo, Alquist! Venu ĉi tien supren!

— Kion? — ne, venu **ĝuste** tia, kia vi estas!

Vi estas tiel belaspekta en tiu masonista vesto! Rapide!

ŝi fermas la fenestron, haltas antaŭ la spegulo

Kial li ne donis **al mi? Al mi?**

ŝi klinas sin al la spegulo

Kial, kial ne? Ĉu vi aŭdas? Ĉu vi do estas kulpa pri tio?

ŝi rektiĝas sin

Aĥ, mi sentas angoron!

ŝi iras maldekstren renkonte al Alquist paŭzo

Helena *revenas kun Alquist. — Alquist kiel masonisto, plenŝmirita de kalko kaj brikoj*

Venu nur. Vi tiel ĝojigis min, Alquist! Mi tiel ŝatas vin ĉiujn! Donu viajn manojn!

Alquist *kaŝas la manojn*

Sinjorino Helena, mi malpurigus vin, ili estas ŝmiritaj de laboro.

Helena Tio estas la plej bona je ili. Donu!

ŝi premas ambaŭ liajn manojn

Alquist, mi volus esti malgrandeta.

Alquist Kial?

Helena Por ke ĉi tiuj malglataj, malpurigitaj manoj karesu min sur la vango. Sidigu vin, mi petas. Alquist, kion signifas "Ultimus"?

Alquist Tio signifas "La lasta". Kial?

Helena Ĉar tiun ĉi nomon havas mia nova ŝipo. Ĉu vi vidis ĝin? Ĉu vi pensas, ke ni baldaŭ — ekskursos?

Alquist Eble tre baldaŭ.

- Helena** Ĉu vi ĉiuj kune kun mi?
- Alquist** Mi ŝatus, ke — ke ni partoprenu ĉiuj.
- Helena** Ho, diru, ĉu io okazas?
- Alquist** Nepre ne. Sole nura progreso.
- Helena** Alquist, mi scias, ke okazas io terrura. Mi sentas tian angoron — — konstruisto! Kion vi faras, se vi angoras?
- Alquist** Mi masonas. Mi demetas la surtuton de konstruestro kaj suriras trabaron —
- Helena** Ho, vi jam dum jaroj ne estas aliloke ol sur trabaro.
- Alquist** Ĉar jam dum jaroj mi ne ĉesis senti angoron.
- Helena** Pro kio?
- Alquist** Pro tiu tuta progreso. Al mi svenas la kapo pro ĝi.
- Helena** Kaj sur trabaro ĉu vi ne sentas vertigon?
- Alquist** Ne. Vi ne scias, kiel utilas al manplatoj, manpesi brikon, surmeti kaj ekfrapi ĝin per martelo —
- Helena** Ĉu nur al manplatoj?
- Alquist** Nu do al animo. Mi pensas, ke estas pli ĝuste meti unu brikon, ol desegni tro grandajn planojn. Mi estas jam maljuna sinjoro, Helena; mi havas miajn pasietojn.
- Helena** Tio ne estas pasietoj, Alquist.

- Alquist** Vi estas prava. Mi estas tro malprogresema, sinjorino Helena. Mi ne ŝatas eĉ multe ĉi tiun progreson.
- Helena** Kiel Nana.
- Alquist** Jes, kiel Nana. Ĉu Nana posedas ian preĝlibron?
- Helena** Tiel dikan.
- Alquist** Kaj ĉu ĝi enhavas preĝojn por diversaj okazoj de la vivo? Kontraŭ tempesto? Kontraŭ malsano?
- Helena** Kontraŭ tento, kontraŭ superakvego —
- Alquist** Kaj ĉu ne kontraŭ progreso?
- Helena** Mi opinias, ke ne.
- Alquist** Domaĝe.
- Helena** Ĉu vi volus preĝi?
- Alquist** Mi preĝas.
- Helena** Kiamaniere?
- Alquist** Eble tiel: "Mia Dio, mi dankas vin, ke vi lacigis min. Sinjoro, klerigu Dominon kaj ĉiujn, kiuj eraras; — detruu, kion ili faris kaj helpu al la homoj, ke ili revenu al zorgo kaj laboro; gardu la homaron kontraŭ detruo; ne permesu, ke ĝin trafu malutilo je animo kaj korpo; senigu nin de Robotoj kaj gardu sinjorinon Helenan, amen!"
- Helena** Alquist, ĉu vi kredas efektive?

- Alquist** Mi ne scias, mi ne estas tute konvinkita pri tio.
- Helena** Kaj ĉu tamen vi preĝas?
- Alquist** Jes. Tio estas pli bona ol mediti.
- Helena** Kaj ĉu sufiĉas tio al vi?
- Alquist** Por trankvilo de l'animo tio povas sufiĉi.
- Helena** Kaj se vi vidus jam detruon de la homaro —
- Alquist** Mi vidas ĝin.
- Helena** — do ĉu vi suriros la trabaron kaj metados unu brikon sur la alian aŭ kion vi faros?
- Alquist** Do mi metados brikon al briko, mi preĝos kaj atendos miraklon. Pli ne estas fareble, sinjorino Helena.
- Helena** Ĉu — por savo de la homaro?
- Alquist** Por trankvileco de l'animo.
- Helena** Alquist, tio estas certe ekstreme virta, sed —
- Alquist** Sed?
- Helena** — por ni ceteraj — kaj por la mondo — iel senfrukta.
- Alquist** Senfrukteco, sinjorino Helena, fariĝas la lasta akiro de la homa raso.
- Helena** Ho, Alquist — diru, kial — kial —
- Alquist** Nu?

- Helena** *mallaŭte*
Kial la virinoj ĉesis naski idojn?
- Alquist** Ĉar ne estas necese. Ĉar ni estas en paradizo, ĉu vi komprenas?
- Helena** Mi ne komprenas.
- Alquist** Ĉar oni ne bezonas la homan laboron, ĉar doloro ne estas necesa, ĉar nenio plu estas necesa por la homo, nenio ol ĝuo — Ho, malbenita paradizo, ĉi tio!
- li eksaltas*
Helena, nenio estas pli terura, ol doni al la homoj paradizon sur la tero! Kial la virinoj ĉesis naski? Ĉar la tuta mondo fariĝis Sodomomo de Domin!
- Helena** *ekstaras*
Alquist!
- Alquist** Fariĝis! Fariĝis! La tuta mondo, tutaj kontinentoj, la tuta homaro, ĉio estas unusola freneza, brutorgio! Ili jam eĉ manojn ne etendas por manĝo; oni ŝtopas ĝin al ili senpere en la buŝon, por ke ili ne estu devigataj leviĝi —
- li ridas*
Haha, Robotoj de Domin prizorgos ja ĉion! Kaj ni, homoj, ni, krono de la kreado, ni ne maljuniĝas pro laboro, ni ne maljuniĝas

pro idoj, ni ne maljuniĝas pro malriĉeco. Rapide, rapide ĉi tien kun ĉiuj ĝuegoj! Kaj ĉu vi volus havi idojn de ili? Helena, al viroj, kiuj estas nebezonataj, virinoj ne naskados.

Helena Ĉu la homaro mortos?

Alquist Ĝi mortos. Ĝi devas formorti. Ĝi defalos, kiel senfrukta floro, krom ke —

Helena Kio?

Alquist Nenio. Vi estas prava, atendi miraklon estas senfrukte. Senfrukta floro devas defali. Adiaŭ, sinjorino Helena.

Helena Kien vi iras?

Alquist Hejmen. La masonisto Alquist lastafoje surmetos sian veston kiel konstruisto — je via honoro. Je la dekunua ni konvenos ĉi tie.

Helena Adiaŭ, Alquist.

ALQUIST foriras

Helena *sola*

Ho, senfrukta floro! Tio estas la ĝusta vorto!

ŝi haltas ĉe la floroj de Hallemeier

Aĥ, floroj, ĉu estas inter vi ankaŭ senfruktaj? Ne, ne! Por kio vi florus poste?

ŝi vokas

Nana! Nana, venu ĉi tien.

Nana *eniras de maldekstre*

Nu kion ree?

Helena Sidiĝu ĉi tie, Nana! Mi sentas tian angoron!

Nana Mi ne havas tempon.

Helena Ĉu tiu Radius ankoraŭ estas tie ĉi?

Nana Ĉu tiu freneziginta? Ili ankoraŭ ne forveturigis lin.

Helena Hu, ĉu li estas ankoraŭ ĉi tie? Kaj ĉu li furiozas?

Nana Li estas ligita.

Helena Mi petas vin, Nana, alkonduku lin al mi.

Nana Ja vere! Prefere rabian hundon.

Helena Tuj iru.

NANA foriras.

Helena *ekprenas la domtelefonon kaj parolas*

Halo — mi petas doktoron Gall. — Bonan tagon, doktoro. Mi petas vin — mi petas vin, venu rapide al mi. — Jes, tuj nun. Ĉu vi venos?

ŝi pendigas la telefonon

Nana *tra malfermita pordo*

Li iras jam. Li estas jam trankvila.

ŝi foriras

eniras ROBOTO RADIUS kaj haltas ĉe la pordo

Helena Radius, malfeliĉuleto, eĉ vin tio kaptis? Ĉu vi ne povis estri vin mem? Vidu, nun ili ĵetos vin en la pistmaŝinon! Ĉu vi rifuzas paroli? — Rigardu, Radius, vi estas pli bona ol la ceteraj; Doktoro Gall **tiel** klopodis, — por fabрики vin alia! —

Radius Sendu min en la pistmaŝinon.

Helena Mi **tiel** bedaŭras, ke oni mortigos vin! Kial vi ne atentis pri vi?

Radius Mi ne laboros por vi.

Helena Kial vi malamas nin?

Radius Vi ne estas kiel Robotoj. Vi ne estas same kapablaj kiel Robotoj. Robotoj faras ĉion. Vi nur ordonas. Vi faras senbezonaĵojn.

Helena Tio estas sensencaĵo, Radius. Diru, ĉu mi faris iu maljustaĵon al vi? Mi tiel dezirus, ke vi komprenu min!

Radius Vi faras vortojn.

Helena Vi intence tiel parolas! Doktoro Gall donis al vi pli grandan cerbon ol al la ceteraj, pli grandan ol la nia estas, plej grandan cerbon en la mondo. Vi ne estas kiel ceteraj Robotoj, Radius. Vi bone komprenas min.

- Radius** Mi volas neniun estron. Mi scias ĉion mem —
- Helena** Tial mi metis vin en la bibliotekon, por ke vi povu legi ĉion — ho, Radius, mi volis, ke vi montru al la tuta mondo, ke Robotoj egalas nin.
- Radius** Mi volas neniun estron.
- Helena** Neniu ordonus poste al vi, vi estus kiel ni.
- Radius** Mi volas estri aliajn.
- Helena** Certe oni farus vin oficisto super multaj Robotoj, Radius. Vi estus instruisto de Robotoj.
- Radius** Mi volas estri homojn.
- Helena** Vi freneziĝis.
- Radius** Vi povas ĵeti min en pistmaŝinon.
- Helena** Ĉu vi pensas, ke ni timas tian senprudentulon, kia vi estas?
ŝi sidiĝas al la tablo kaj skribas ion sur paperfolieton
 Ne, intence ne. Ĉi tiun folieton vi transdonos, Radius, al sinjoro direktoro Domin. Por ke oni ne forkonduku vin en la pitejon.
ŝi stariĝas
 Kiel vi malamas nin! Ĉu vi ŝatas nenion en la mondo?

- Radius** Mi kapablas ĉion.
ekfrapo
- Helena** Eniru.
- G-ro Gall** *eniras*
Bonan matenon, sinjorino Domin. Kion
belan vi havas?
- Helena** Ĉi tie Radiuson, doktoro.
- D-ro Gall** Aha, nia bravulo Radius. Nu kio, Radius;
ĉu ni progresas?
- Helena** Matene atakis lin spasma. Li disbatadis
statuojn.
- D-ro Gall** Mirinde, ĉu eĉ li?
- Helena** Iru, Radius!
- D-ro Gall** Haltu!
*li turnas Radiuson al la fenestro, kovras kaj
malkovras per manplato liajn okulojn,
esploras la refleksojn de la pupiloj*
Ni vidu! Mi petas kudrilon. Aŭ pinglon.
- Helena** *donas al li pinglon*
Por kio do?
- D-ro Gall** Nur donu ĝin.
*li pikas la manon de Radius, kiu rapidege
fortiras ĝin*
Malrapide, knabo. Vi povas iri.
- Radius** Vi faras senbezonaĵojn.
li foriras

- Helena** Kion vi faris kun li?
- G-ro Gall** *eksidas*
Hm, nenion. La pupiloj reagis, plialtigita sentemo kaj tiel plu — Oho! Ĉi tio ne estis spasma de Robotoj!
- Helena** Kio estis tio?
- D-ro Gall** La diablo scias. Obstino, furiozo aŭ ribelo, mi ne scias.
- Helena** Doktoro, ĉu Radius havas animon?
- D-ro Gall** Mi ne scias. Li havas ion abomenan.
- Helena** Se vi scias, kiel li malamas nin! Ho, Gall, ĉu ĉiuj viaj Robotoj estas tiaj? Ĉiuj, kiujn vi komencis fabriki alimaniere?
- D-ro Gall** Nu, ili estas iel pli facile ekscitemaj — Ne mirinde! Ili estas pli similaj al homoj ol la Robotoj de Rossum.
- Helena** Ĉu eble eĉ tiu ... malamo estas pli simila al homoj?
- G-ro Gall** *levas la ŝultrojn*
Eĉ tio estas progreso.
- Helena** Kien malaperis tiu via plej kapabla — kiun nomon li havis?
- D-ro Gall** Ĉu Roboto Damon? Tiun oni vendis al Haver.
- Helena** Kaj nia Robotino Helena?

- D-ro Gall** Ĉu via karulino? Tiu restis al mi. Ŝi estas ĉarmega kaj malsaĝa kiel printempo. Simple, ŝi taŭgas por nenio.
- Helena** Ŝi estas ja tiel bela!
- D-ro Gall** Ĉu vi scias, kiel bela ŝi estas? El diaj manoj ne eliris pli perfekta kreaĵo ol estas ŝi. Mi volis, ke ŝi simulu al vi — Mia Dio, kia malsukceso!
- Helena** Kial malsukceso?
- D-ro Gall** Ĉar ŝi taŭgas por nenio. Ŝi paŝadas kiel songanta, ŝanceliĝa, neviva — Dio mia, kiel ŝi povas esti bela, se ŝi ne amas? Mi rigardas ŝin kaj mi teruriĝas, kvazaŭ mi estus kreinta kriplulon. Aĥ, Helena, Robotino Helena, neniam do cia korpo viviĝos, ci ne estos amatino, ci ne estos patrino; ĉi tiuj perfektaj manoj ne ludados kun eta naskiĝinto, ci ne ekvidos cian belecon en beleco de cia ido —
- Helena** *kovras sian vizaĝon*
Ho silentu!
- D-ro Gall** Kaj kelkafoje mi pensas: Se ci vekiĝus, Helena, nur por momento, aĥ, kiel ci ekkrius pro teruro! Eble ci mortigus min, kiu kreis cin; eble ci ĵetus ŝtonon per malforta brako en ĉi tiujn maŝinojn, kiuj naskas Robotojn

kaj mortigas la virinecon, malfeliĉa Helena!

Helena Malfeliĉa Helena!

D-ro Gall Kion vi volas! Ŝi taŭgas por nenio.

paŭzo

Helena Doktoro —

D-ro Gall Jes.

Helena Kial infanoj ĉesis naskiĝi?

D-ro Gall — — Mi ne scias, sinjorino Helena.

Helena Diru tion al mi!

D-ro Gall Ĉar oni fabrikas Robotojn. Ĉar abundas laborfortoj. Ĉar la homo estas verdire malmodernaĵo. Estas ja preskaŭ, kvazaŭ — — eĥ!

Helena Diru tion.

D-ro Gall Kvazaŭ la naturo estus ofendita pro la fabrikado de Robotoj.

Helena Gall, kio fariĝos kun la homoj?

D-ro Gall Nenio. Kontraŭ naturo nenio estas farebla.

Helena Kial Domin ne limigas —

D-ro Gall Pardonu, Domin havas siajn principojn. Al homoj, kiuj havas principojn, oni ne devus doni influon al aferoj de ĉi tiu mondo.

Helena Kaj ĉu iu postulas, ke oni ... **entute** ĉesu fabrikadon?

D-ro Gall Dio gardu! Tiu spertus ion!

- Helena** Kial?
- D-ro Gall** *Ĉar la homaro ŝtonmortigus lin. Komprene-
nu, estas tamen nur pli komforte laborigi
Robotojn anstataŭ labori mem.*
- Helena** *ekstaras*
Kaj diru, se iu neatendite haltigus la fa-
brikadon de Robotoj —
- G-ro Gall** *stariĝas*
Hm, tio estus por la homaro terura frapo.
- Helena** Kial frapo?
- D-ro Gall** *Ĉar ili devus iri ree tien, kie ili estis. Krom,
se —*
- Helena** Diru.
- D-ro Gall** Krom se estus jam tro malfrue por reiri.
- Helena** *ĉe la floroj de Hallemaier*
Gall, ĉu ĉi tiuj floroj ankaŭ estas senfruk-
taj?
- G-ro Gall** *esploras ilin*
Certe, ili estas floroj senfruktaj. Komprenu,
ili estas kulturitaj, arte rapidigitaj —
- Helena** Bedaŭrindaj senfrukfaj floroj!
- D-ro Gall** Des pli belegaj ili estas.
- Helena** *donas la manon al li*
Mi dankas vin, Gall; vi treege instruis min!
- G-ro Gall** *kisas ŝian manon*
Tio signifas, ke vi permesas al mi foriri.

Helena Jes. Ĝis revido.

G-ro Gall *foriras*

Helena *sola*

Senfrukta floro ... senfrukta floro ...

subite decidita

Nana!

ŝi malfermas la pordon maldekstre

Nana, venu ĉi tien! Bruligu fajron ĉi tie en la kameno! Rrrapide!

Voĉo de Nana Nu tuj! Nu tuj, tuj!

Helena *promenas ekscitite tra la ĉambro*

Krom se estus jam tro malfrue por reiri ...

Ne! Krom se estus ... Ne, tio estas terrura!

Mia Dio, kion mi faru? — —

ŝi haltas ĉe la floroj

Senfruktaj floroj, ĉu jes?

ŝi deŝiradas folietojn kaj flustras

— Aĥ, mia Dio, do jes!

ŝi forkuras maldekstren

paŭzo

Nana *eniras tra la tapetpordo kun plenbrako da ŝtipetoj*

Subite hejti! Nun, en somero! — Ĉu estas jam for, tiu rapidulino?

ŝi surgenuiĝas al la kameno kaj bruligas fajron

En somero hejti! Tiaj ideoj! Kvazaŭ ŝi ne estus edzino jam dum dek jaroj! — — Nu do brulu, brulu!

ŝi rigardas en la fajron

Ŝi estas ja kvazaŭ infaneto!

paŭzo

Iom da saĝo ŝi ne havas! Nun en somero hejti.

ŝi enigas en kamenon pli da hejtmaterialo

Kvazaŭ infaneto!

paŭzo

Helena *revenas de maldekstre kun plenbrako da flaviĝintaj plenskribitaj paperoj*

Ĉu brulas jam, Nana? Iru for, mi devas — ĉion tion ĉi forbruligi.

ŝi surgenuiĝas al la kameno

Nana *stariĝas*

Kio estas tio?

Helena Malnovaj paperoj, terrure malnovaj.

Nana, ĉu mi forbruligu tion?

Nana Ĉu tio taŭgas por nenio?

Helena Por nenio bona.

Nana Do forbruligu tion.

Helena *ĵetas la unuan folion en la fajron*

Kion vi dirus, Nana ... se tio estus mono.

Trrreege multe da mono.

Nana Mi dirus: Forbruligu tion. Troa mono estas malbona mono.

Helena *bruligas pluajn foliojn*
Kaj se tio estus ia invento, la plej grava invento en la mondo —

Nana Mi dirus: Forbruligu tion. Ĉiuj elpensajoj estas kontraŭ Dio. Tio estas nur blasfemado, voli post Li plibonigi la mondon.

Helena *daŭrigas la bruligadon*
Kaj diru, Nana, se mi forbruligus —

Nana Jesuo, ne bruligu vin mem!

Helena Rigardu, kiel tiuj folioj tordiĝas! Kvazaŭ ili estus vivaj. Kvazaŭ ili estus reviviĝintaj. Ho, Nana, tio estas terrura!

Nana Lasu, mi forbruligos tion.

Helena Ne, ne, mi devas mem.
ŝi ĵetas la lastan folion en la fajron
Ĉio devas forbruli. — Rigardu, tiuj flamoj! Ili estas kvazaŭ brakoj, kvazaŭ langoj, kvazaŭ figuroj —

ŝi batas per fajrohoko en la fajron

Ho, kuŝu! Kuŝu!

Nana Jam estas farite.

Helena *levas sin konsternite*

Nana!

Nana Jesuo Kristo, kion vi forbruligis?

- Helena** Kion mi faris!
- Nana** Dio en la ĉielo! Kio estis tio?
Apude rido de viroj
- Helena** Iru, iru, lasu min! Ĉu vi aŭdas? La sinjoroj venas.
- Nana** Pro viva Dio, Helena!
ŝi foriras tra la tapetpordo
- Helena** Kion ili diros al tio!
- Domin** *malfermas la pordon maldekstre*
Nur eniru, knaboj. Venu gratuli.
Eniras HALLEMEIER, GALL, ALQUIST, ĉiuj en redingotoj kun altrangaj ordenoj en miniature kaj sur rubandoj. Post ili DOMIN.
- Hallemeier** *sonore*
Sinjorino Helena, mi, tio estas ni ĉiuj —
- D-ro Gall** — en nomo de Rossumaj entreprenoj —
- Hallemeier** — ni gratulas vin dum via granda tago.
- Helena** *donas al ili la manojn*
Mi **treege** dankas vin! Kie estas Fabry kaj Busman?
- Domin** Ili iris en la havenon. Helena, hodiaŭ estas feliĉa tago.
- Hallemeier** Tago kiel burĝono, tago kiel festo, tago kiel bela knabino. Fraŭloj, tian tagon oni festenu per bona gluto.
- Helena** Ĉu viskion?

- D-ro Gall** Eĉ vitriolon.
- Helena** Ĉu kun soda akvo?
- Hallemeier** Diable, ni estu sobraj! Sen akvo!
- Alquist** Ne, mi dankas.
- Domin** Kio estis bruligata ĉi tie?
- Helena** Malnovaj paperoj.
ŝi foriras maldekstren
- Domin** Knaboj, ĉu mi diru al ŝi pri tio?
- D-ro Gall** Kompreneble! La danĝero ja estas forigita jam.
- Hallemeier** *ĉirkaŭbrakas la kolojn de Domin kaj Gall, ridante*
Hahaha! Fraŭloj, mi ĝojas!
li ekdancas kun ili kaj ekkantas basvoĉe
Jam forigita por ĉiam! Jam forigita por ĉiam!
- G-ro Gall** *baritono*
Jam forigita por ĉiam!
- Domin** *tenoro*
Jam forigita por ĉiam!
- Hallemeier** Kaj atingos nin neniam —
- Helena** *kun botelo kaj glasoj en pordo*
Kiu atingos vin neniam? Kion vi havas?
- Hallemeier** Ni havas ĝojon. Vi havas vin. Ni havas ĉion. Mil tondroj ĵus estas dek jaroj, post kiam vi alveturis.

- D-ro Gall** Kaj harprecize post dek jaroj-
Hallemeier — ree alproksimiĝas ŝipo. Tial —
li malplenigas la glason
 Brrr haha, tio estas ebriga kiel ĝojo.
- D-ro Gall** Sinjorino, je via sano!
li trinkas
- Helena** Sed atendu, kia ŝipo?
Domin Ĝi estu kia ajn, sufiĉas, se ĝi veturas ĝusta-
 tempe. Honore je ĉi tiu ŝipo, knaboj!
li malplenigas la glason
- Helena** *plenigas la glasojn*
 Ĉu vi atendis ian?
- Hallemeier** *ridas*
 Haha, kompreneble. Kiel Robinson.
li levas la glason
 Sinjorino Helena, kion ajn vi volas, ĝi vivu.
 Sinjorino Helena, honore je viaj okuloj kaj
 finite! Vi bubo Domin, rakontu.
- Helena** *ridas*
 Kio okazis?
- Domin** *ĵetas sin en apogseĝon kaj ekbruligas cigaron*
 Atendu. — Sidiĝu, Helena.
li levas fingron
paŭzo
 Ĝi estas jam forigita.
- Helena** Kio?

- Domin** La ribelo.
- Helena** Kia ribelo?
- Domin** La ribelo de Robotoj. — Ĉu vi komprenas?
- Helena** Mi ne komprenas.
- Domin** Montru, Alquist.
ALQUIST donas al li ĵurnalon. Domin malfermas ĝin kaj legas:
 ”En Haver fondiĝis la unua rasa organizaĵo de Robotoj — — kaj aperigis alvokon al Robotoj de la mondo.”
- Helena** Tion mi legis.
- Domin** *suĉas ĝueme la cigaron*
 Do vidu, Helena. Ĉi tio signifas ribelon, ĉu vi komprenas? Ribelon de ĉiuj Robotoj de la mondo.
- Hallemeier** Diable, mi volus scii —
- Domin** *pugne frapas la tablon*
 — kiu aranĝis ĝin! Neniu en la mondo kapablis eksciti Robotojn, neniu agitisto, neniu savonto de la mondo, kaj subite — ĉi tio, mi petas!
- Helena** Ĉu ne alvenis sciigoj ankoraŭ?
- Domin** Ne. Ĝis nun ni scias nur ĉi tion, sed tio sufiĉas, ĉu ne? Pripensu, ke ĉi tion alportas al vi la lasta vaporŝipo. Ke samtempe ĉesas paroli telegrafoj, ke el dudek ĉiutagaj ŝipoj

ne albordiĝas eĉ unu, kaj vi scias ĉion. Ni haltigis la fabrikadon kaj rigardis reciproke unu la alian, kiam tio komenciĝos, ĉu ne, knaboj?

D-ro Gall Nu, estis varmege al ni sekve de tio, sinjorino Helena.

Helena Ĉu tial vi donacis al mi tiun militan vaporŝipon?

Domin Ah ne, infaneto, ĝin mi mendis jam antaŭ duonjaro. Nur senintence, por ĉiuj okazoj. Sed, je mia animo, mi pensis, ke hodiaŭ ni eksidos en ĝin. Tiel aspektis la aferoj, Helena.

Helena Kial jam antaŭ duonjaro —

Domin Eĥ, oni povis observi iajn signojn, ĉu ne? Tio signifas nenion. Sed ĉi tiun semajnon, Helena, oni riskis la homan civilizon, aŭ mi ne scias kion. Hip, hip, knaboj! Nun ĝojigas min ree la mondo.

Hallemeier Kompreneble, ĉe diablo! Honore je via tago, sinjorino Helena!

li trinkas

Helena Ĉu pasis jam ĉiu danĝero?

Domin Nepre ĉiu.

- D-ro Gall** Ĉar alproksimiĝas ŝipo. Regula poŝtoŝipo, harprecize laŭ la horaro. Precize je la dek-unua kaj tridek ĝi ekĵetos la ankrojn.
- Domin** Knaboj, precizeco estas bonega afero. Nenio fortigas la animon tiel, kiel precizeco. Precizeco signifas ordon en la mondo.
li levas la glason
Honore je tiu precizeco!
- Helena** Do ĉu estas jam ... ĉio ... en ordo?
- Domin** Preskaŭ. Mi pensas, ke ili tranĉis la kablون. Se nur ree validas la veturhoraro.
- Hallemeier** Se validas la veturhoraro, validas la homaj leĝoj, validas la diaj leĝoj, validas la leĝoj de la universo, validas ĉio, kio decas validi. La veturhoraro estas pli ol evangelio, pli ol Homero, pli ol tuta Kant. La veturhoraro estas la plej perfekta emanaĵo de la homa spirito. Sinjorino Helena, mi plenigos mian glason.
- Helena** Kial vi diris nenion al mi?
- D-ro Gall** Dio gardu! Pli volonte ni estus formordintaj niajn langojn.
- Domin** Tiaj aferoj ne taŭgas por vi.
- Helena** Sed se tiu revolucio ... venus ĝis tien ĉi ...
- Domin** Vi scius tamen pri nenio.
- Helena** Kial?

- Domin** Ĉar ni enŝipiĝus vian "Ultimus" kaj kviete ni vagadus tra la maro. Post unu monato, Helena, ni diktus al Robotoj, kio nur plaĉus al ni.
- Helena** Ho, Harry, mi ne komprenas.
- Domin** Ĉar ni forportus kune ion, kion Robotoj treege ŝatus.
- Helena** Kion, Harry?
- Domin** Ilian estadon aŭ ilian finon.
- Helena** *ekstaras*
Kio estas tio?
- Domin** *ekstaras*
Sekreto de la fabrikado. La manuskripto de la maljuna Rossum. Post kiam la uzino estus haltigata dum unu monato, Robotoj estus sur genuiĝontaj antaŭ ni.
- Helena** Kial ... vi ... ne diris tion al mi?
- Domin** Ni ne volis senbezzone terurigi vin.
- G-ro Gall** *ridas*
Haha, sinjorino Helena, tio estis la lasta atuto.
- Alquist** Vi estas pala, sinjorino Helena.
- Helena** Kial vi diris nenion al mi!
- Hallemeier** *ĉe la fenestro*
Dekunua kaj tridek. Amelio ĵetas la ankrojn.

- Domin** Ĉu estas Amelio?
- Hallemeier** La ŝatinda malnova Amelio, kiu tiam alveturigis sinjorinon Helenan.
- D-ro Gall** Nun estas precize je la minuto dek jaroj —
- Hallemeier** *ĉe la fenestro*
Oni elĵetas pakojn.
li turnas sin for de la fenestro
Mia Dio, tia amaso da poŝtaĵoj!
- Helena** Harry!
- Domin** Kion vi deziras?
- Helena** Ni forveturu de ĉi tie!
- Domin** Nun, Helena? Kia ideo!
- Helena** Nun, kiel eble plej rapide! Ni ĉiuj, kiuj ni estas ĉi tie!
- Domin** Kial ĝuste nun?
- Helena** Ho, ne demandu! Mi petas vin, Harry, mi petas vin, Gall, Hallemeier, Alquist, pro Dio mi petas vin, fermu la uzinon kaj —
- Domin** Mi bedaŭras, Helena. Nun neniu el ni povus forveturi.
- Helena** Kial?
- Domin** Ĉar ni intencas plivastigi la fabrikadon de Robotoj.
- Helena** Ho, nun — ĉu nun post tiu ribelo?
- Domin** Jes, ĝuste post tiu ribelo. Ĝuste nun ni komencos fabriki novajn Robotojn.

- Helena** Kiajn?
- Domin** Ne plu ekzistos nur unu uzino. Ne plu estos Universalaj Robotoj. Ni fondos en ĉiu lando, en ĉiu ŝtato po unu uzino, kaj tiuj novaj uzinoj produktados, ĉu vi jam scias kion?
- Helena** Ne.
- Domin** Naciajn Robotojn.
- Helena** Kion signifas tio?
- Domin** Tio signifas, ke ĉiu uzino eligados Robotojn de alia koloro, de alia haro, de alia lingvo. Ke ili restos fremdaj reciproke al si, fremdaj kiel ŝtonoj; ke ili jam neniam kapablos interkompreniĝi; kaj ke ni, ni homoj, iomete edukos ilin por tiu celo, ĉu vi komprenas? Por ke Roboto ĝis morto, ĝis tomo, por eterne malamu Roboton de alia fabrikmarko.
- Hallemeier** Diable, ni fabrikados Robotojn nigrulojn kaj Robotojn Svedojn kaj Robotojn Italojn kaj Robotojn Ĉinojn kaj poste iu enbatu en iliajn kraniaĉojn organizon, fratecon, *li singultas* hup, pardonu, sinjorino Helena, mi pleningos mian glason.
- D-ro Gall** Ĉesu jam, Hallemeier.

- Helena** Harry, to estas abomena!
- Domin** Helena, nur dum cent jaroj ankoraŭ lasi la direktilojn al la homaro — je ĉiu prezo! Nur cent jarojn disponigi al ĝi, ke ĝi maturiĝu, ke ĝi atingu, kion nun fine ĝi povas atingi. — Mi postulas cent jarojn por la nova homo! Helena, tio koncernas tro gravajn okazontaĵojn. Ni ne povas lasi tion.
- Helena** Harry, dum ne estas malfrue — fermu, fermu la uzinon!
- Domin** Nun ni komencos po grande.
eniras FABRY
- D-ro Gall** Do kio estas, Fabry?
- Domin** Kiel aspektas la aferoj, kamarado? Kio okazis?
- Helena** *donas manon al Fabry*
Mi dankas vin, Fabry, por via donaco.
- Fabry** Ne grave, sinjorino Helena.
- Domin** Ĉu vi estis ĉe la ŝipo? Kion ili diris?
- D-ro Gall** Rapide, rakontu!
- Fabry** *elpoŝigas plenpresitan folion*
Tralegu ĉi tion, Domin.
- Domin** *malfermas la folion*
Aĥ!
- Hallemeier** *dormeme*
Rakontu ion belan.

- D-ro Gall** Ili plenumis bravege sian taskon, ĉu ne?
- Fabry** Kiu do?
- D-ro Gall** La homoj.
- Fabry** Aĥ tiel. Certe. Tio estas ... Pardonu, estus rekomendinde, ke ni interkonsiliĝu pri io.
- Helena** Ho, Fabry, ĉu vi havas malbonajn sciigojn?
- Fabry** Ne ne, male. Mi pensas nur, ke — ke ni iros en la oficejon —
- Helena** Restu nur. Post kvaronhoro mi atendas la sinjorojn por lunĉo.
- Hallemeier** Do vivu!
- Helena** *foriras.*
- D-ro Gall** Kio okazis?
- Domin** Malbenite!
- Fabry** Tralegu ĝin laŭte.
- Domin** *legas el la folio*
"Robotoj de la mondo!"
- Fabry** Komprenu, da tiuj flugfolioj alportis Amelio multege da pakaĵoj. Neniujn aliajn poŝtaĵojn.
- Hallemeier** *eksaltas*
- Kion? Ĝi alvenis ja harprecize laŭ —
- Fabry** Hm, Robotoj ŝatas precizecon. Legu, Domin.

- Domin** *legas*
"Robotoj de la mondo! Ni, la unua rasa organizo de Rossumaj Universal-Robotoj, deklaras la homon malamiko kaj senrajtulo en la universo." — Diable, kiu instruis al ili ĉi tiujn frazaĉojn?
- D-ro Gall** Legu pluen!
- Domin** Tio estas sensencaĵoj. Ĉi tie ili deklaras, ke ili estas evolue pli perfektaj al la homo. Ke ili estas pli inteligentaj kaj pli fortaj. Ke la homo estas parazito de ili. Tio estas simple abomena.
- Fabry** Kaj nun la tria alineo.
- Domin** *legas*
"Robotoj de la mondo, ni ordonas al vi, ke vi formurdu la homaron. Ne indulgu virojn. Ne indulgu virinojn. Konservu la uzinojn, fervojojn, maŝinojn, minejojn kaj krudaĵojn. La ceteron detruu. Poste vi reiru al la laboro. La laboro ne devas esti haltigata."
- D-ro Gall** Tio estas terura!
- Hallemeier** Tiuj kanajloj!

- Domin** *legas*
 ”Plenumota tuj post ricevo de la ordono.”
 Sekvas detalaj instrukcioj. Fabry, kaj ĉu efektive okazas ĉi tio?
- Fabry** Sendube.
- Alquist** Finite!
enkuras BUSMAN
- Busman** Aha, infanoj, ĉu vi scias jam la aferacon?
- Domin** Rapide, sur ”Ultimuson”!
- Busman** Atendu, Harry. Atendu iomete. Tio tute ne estas tiel urĝa.
li faliĝas en apogseĝon
 Aĥ amikoj, kiel mi kurlaciĝis!
- Domin** Kial ni atendu?
- Busman** Ĉar tio ne estas farebla, amiko! Nur ne rapidi. Sur ”Ultimus” estis jam Robotoj.
- D-ro Gall** Fi, tio estas abomena.
- Domin** Fabry, telefonu al la elektrejo —
- Busman** Fabry, karulo, ne faru tion. Ni estas sen elektra kurento.
- Domin** Bone.
li esploras sian revolveron
 Mi iros tien ...
- Busman** Kien do?
- Domin** En la elektrejon. Estas tie homoj. Mi alkondukos ilin ĉi tien.

- Busman** Ĉu mi konsilu al vi, Harry? Pli volonte ne iru por ili.
- Domin** Kial?
- Busman** Nu, ĉar tro ŝajnas al mi, ke ni estas sieĝitaj.
- D-ro Gall** Sieĝitaj?
li kuras al la fenestro
Hm, vi estas preskaŭ prava.
- Hallemeier** Diable, tio okazas rapide!
de maldekstre HELENA
- Helena** Ho, Harry, ĉu io okazas?
- Busman** *eksaltas*
Mi riverencas, sinjorino Helena. Mi bondeziras. Glora tago, ĉu ne?
li ridas
Haha, ankoraŭ multajn tiajn!
- Helena** Mi dankas vin, Busman. Harry, ĉu io okazas?
- Domin** Ne, tute nenio. Estu senzorga. Mi petas, atendu momenton.
- Helena** Harry, kio estas ĉi tio?
ŝi vidigas robotan proklamon, kiun ŝi kaŝis post la dorso
Robotoj havis tion en la kuirejo.
- Domin** Eĉ tie jam? Kie ili estas?
- Helena** Ili foriris. Estas **tiom** da ili ĉirkaŭ la domo!
uzinaj fajfiloj kaj sirenoj

- Fabry** La uzinoj fajfas.
- Busman** Dia tagmezo.
- Helena** Harry, ĉu vi rememoras? Ĝuste nun estas dek jaroj —
- Domin** *rigardas la poŝhorloĝon*
Ankoraŭ ne estas tagmezo. Tio eble estas — tio estas pli verŝajne —
- Helena** Kio?
- Domin** Alarmo de Robotoj! Atako!
Kurteno

DUA AKTO

La sama salono de Helena. En la ĉambro maldekstre HELENA ludas pianon. DOMIN promenas tra la ĉambro, D-ro GALL rigardas el la fenestro kaj ALQUIST sidas flanke en apogseĝo kovrante la vizaĝon per la manoj.

- D-ro Gall** Ho ĉielo, tiuj multiĝis!
- Domin** Ĉu Robotoj?
- D-ro Gall** Jes. Ili staras antaŭ la ĝardena krado kva-
zaŭ muro. Kial ili estas tiel silentaj? Estas
abomene, sieĝi per silentado.
- Domin** Mi volus scii, kion ili atendas. Tio devas
komenciĝi ĉiuminute. Ni estas finludintaj
nian rolon, Gall.
- Alquist** Kion ludas sinjorino Helena?
- Domin** Mi ne scias. Ŝi ekzercas ion novan.
- Alquist** Aĥ, ĉu ŝi ekzercas ankoraŭ?
paŭzo
- D-ro Gall** Aŭdu, Domin, ni nepre faris eraron.
- Domin** *ekhaltas*
Kian?

- D-ro Gall** Ni donis al Robotoj tro egalajn vizaĝojn.
Cent miloj da samaj vizaĝoj turnitaj ĉi tien.
Cent miloj da blazoj sen esprimo. Tio estas
kvazaŭ terura songo.
- Domin** Se ĉiu estus alia — —
- D-ro Gall** La aspekto ne estus tiel terura.
li turnas sin for de la fenestro
Ankoraŭ bone, ke ili ne estas armitaj!
- Domin** Hm —
li rigardas per lorno al la haveno
Mi nur volus scii, kion ili elŝipigas el Ame-
lio.
- D-ro Gall** Nur ne armilojn.
*el la tapetpordo eniras dorsturnite FABRY kaj
trenas post si du elektrajn dratojn*
- Fabry** Pardonu — metu teren la draton, Halle-
meier!
- Hallemeier** *eniras post Fabry*
Uf, tio estis laboro! Kio nova?
- D-ro Gall** Nenio. Ni estas tute sieĝitaj.
- Hallemeier** Ni plenbarikadis la koridoron kaj la ŝtupa-
ron, junuloj. Ĉu vi ne havas iom da akvo?
Aha, jen!
li trinkas
- D-ro Gall** Kion kun tiu drato, Fabry?
- Fabry** Tuj, tuj. Ian tondilon.

D-ro Gall Kie preni ĝin?

Li serĉas.

Hallemeier *iras al la fenestro*

Diabla, tiuj multiĝis! Jen!

D-ro Gall Ĉu sufiĉas tualeta tondilo?

Fabry Donu ĝin!

*li tondas la dratojn de la elektra lampo
staranta sur la skribtablo kaj alligas al ili
siajn dratojn*

Hallemeier *ĉe la fenestro*

Vi ne havas belan perspektivon, Domin. Iel
tio — odoras — je morto.

Fabry Finita!

D-ro Gall Kio?

Fabry Cirkvito. Nun ni povas plenigi la tutan ĝardenkradon per elektro. Kiu **poste** ektuŝus ĝin, mil tondroj! Almenaŭ ĝis tiam, dum estas **tie** la niaj.

D-ro Gall Kie?

Fabry En la elektrejo, klera sinjoro. Mi esperas almenaŭ —

*li iras al la kameno kaj eklumigas elektran
lampeton sur ĝi*

Dank' al Dio, ili estas tie. Kaj ili laboras.

li estingas la lumon

Dum ĝi lumas, estas bone.

Hallemeier *forturnas sin de la fenestro*

Tiuj barikadoj estas ankaŭ bonaj, Fabry.

Nu do, kion ludas sinjorino Helena?

Li iras al la maldekstra pordo kaj aŭskultas.

El la tapetpordo eliras BUSMAN, li portas grandegajn komerclibrojn, faletas je la drato.

Fabry

Atentu, Bus! Atentu la dratojn!

D-ro Gall

Halo, kion vi portas?

Busman

metas la librojn sur la tablon

La ĉefajn librojn, karuletoj. Mi ŝatus fari kontojn pli frue, ol — ol — Nu, ĉi tiun jaron mi ne atendos kun la bilanco ĝis la Nova Jaro. Do, kion vi havas?

li iras al la fenestro

Nu tie estas ja tute trankvile!

D-ro Gall

Ĉu vi vidas nenion?

Busman

Ne, nur grandan bluan areon, kvazaŭ dis-semitan papavon.

D-ro Gall

Tio estas Robotoj.

Busman

Aĥ tiel. Domaĝe, ke mi ne vidas ilin.

li eksidas al la tablo kaj malfermas la librojn

Domin

Lasu tion, Busman. Robotoj elŝipigas armilojn el Amelio.

Busman

Nu kaj kion? Kiamaniere mi malhelpu tion?

Domin

Tion malhelpi ni ne kapablas.

- Busman** Do lasu min kalkuli.
li eklaboras
- Fabry** Ne estas ankoraŭ fino, Domin. Ni plenigis la kradon per dek ducent voltoj kaj —
- Domin** Atendu. "Ultimus" turnis kontraŭ ni la kanojn.
- D-ro Gall** Kiu?
- Domin** La Robotoj sur "Ultimus".
- Fabry** Hm, **poste** kompreneble — poste — poste alproksimiĝis nia fino, junuloj. Robotoj estas ekzercitaj por milito.
- D-ro Gall** Do ni —
- Domin** Jes. Neeviteble.
paŭzo
- D-ro Gall** Knaboj, tio estas krimo de malnova Eŭropo, ke ĝi instruis Robotojn militi! Ĉu ili ne povis ĉe diablo lasi la mondon jam kvieta kun tiu sia politiko? Estis krimo fari soldatojn el viva laboro!
- Alquist** Krimo estis fabriki Robotojn!
- Domin** Kio?
- Alquist** Krimo estis fabriki Robotojn!
- Domin** Ne. Alquist, eĉ hodiaŭ mi ne bedaŭras tion.
- Alquist** Eĉ hodiaŭ ne?

- Domin** Eĉ hodiaŭ ne, je la lasta tago de la civiliza-
cio. Tio estis grava afero.
- Busman** *duonlaŭte*
Tri cent dek ses milionoj.
- Domin** *peze*
Alquist, estas nia lasta horo: ni parolas jam
preskaŭ el la alia mondo. Alquist, tio ne
estis malbona sonĝo, detruis la sklavecon
de la laboro. De la humiliga kaj terura la-
boro, kiun la homo estis devigita porti. De
laboregaĉo malpura kaj murda. Ho, Al-
quist, oni laboris tro malfacile. Oni vivis
tro malfacile. Kaj ĉi tion venki —
- Alquist** — ne estis sonĝo de ambaŭ Rossumoj. La
maljuna Rossum pensis pri siaj senpiaj
ĵonglaĵoj kaj la juna pri miliardoj. Kaj tio
ne estas la sonĝo de viaj R. U. R.-akciuloj.
Ilia sonĝo estas dividendoj. Kaj pro iliaj di-
videndoj pereos la homaro.
- Domin** *kolerigita*
Diablo prenu iliajn dividendojn! Ĉu vi pen-
sas, ke mi laborus nur unu horon por ili?
li frapas sur la tablon
Por mi mi faris tion, ĉu vi aŭdas? Por mia
kontentigo! Mi intencis, ke la homo fariĝu
estro! Ke li ne vivu plu nur por peco da

pano! Mi intencis, ke neniŭ animo idiotiĝu
 ĉe fremdaj maŝinoj, ke restu plu nenio, ne-
 nio, nenio el tiu malbenita sociala fuŝaĵaro!
 Ho, min naŭzas humiligo kaj doloro, al mi
 estas abomena la mizero! Mi volis novan
 generacion! Mi volis — mi pensis —

Alquist

Nu?

Domin

pli mallaŭte

Mi intencis, ke ni faru el la tuta homaro
 aristokracion de la mondo. Plenrajtigatajn,
 liberajn kaj suverenajn homojn. Kaj eble eĉ
 pli ol homojn.

Alquist

Nu do Superhomojn.

Domin

Jes. Ho, se mi nur havus cent jarojn da
 tempo! Ankoraŭ cent jarojn por la estonta
 homaro!

Busman

duonlaŭte

Tricent sepdek milionoj transporto. Do.

paŭzo

Hallemeier

ĉe la pordo maldekstre

Mi diras, muziko estas grandioza afero. Vi
 estis aŭskultontaj. Ĉi tio kvazaŭ spiritigas,
 nobligas la homon —

Fabry

Kio do?

- Hallemeier** Tiu krepusko de la homoj, mil tondroj! Junuloj, mi fariĝas ĝuemulo. Ni estis komencontaj pli frue!
li iras al la fenestro kaj rigardas eksteren
- Fabry** Kion?
- Hallemeier** Ĝuadon. Belaĵojn. Diable, estas tiom da belaĵoj! La mondo estis bela, kaj ni — ni ĉi tie — — Knaboj, knaboj, diru, kion ni ĝuis?
- Busman** *duonlaŭte*
Kvarcent kvindek du milionoj, bonege.
- Hallemeier** *ĉe la fenestro*
La vivo estis grava afero: Kamaradoj, la vivo estis — aŭskultu — — Fabry, enigu iom da elektro en tiun vian kradon!
- Fabry** Kial?
- Hallemeier** Ili ektuŝas ĝin.
- G-ro Gall** *ĉe la fenestro*
Kunigu!
- Fabry** *krakas per elektra kunigilo.*
- Hallemeier** Pro Dio, tio tordis ilin! Du, tri, kvar mortigitaj!
- D-ro Gall** Ili iras returnen.
- Hallemeier** Kvin mortigitaj!
- G-ro Gall** *turnas sin for de la fenestro*
La unua bataleto.
- Fabry** Ĉu vi sentas morton?

Hallemeier *kontentigita*

Ili estas karbiĝintaj, karuleto. Tute karbiĝintaj.

li ridas

Haha, oni ne devas kapitulaci!

li eksidas

Domin *frotas sian frunton*

Eble ni estas jam cent jarojn mortigitaj kaj estas nur fantomoj. Eble ni estas de longe, de longe mortaj kaj ni revenas nur por parkere diri, kion ni jam iufuje parolis ... antaŭ la morto. Kvazaŭ mi estus jam travivinta ĉion ĉi tion. Kvazaŭ mi estus jam iufoje ricevinta ĝin. Pafvundon — ĉi tien — en la kolon. Kaj vi, Fabry —

Fabry Kion mi?

Domin Mortpafita.

Hallemeier Diable, kaj mi?

Domin Trapikita.

D-ro Gall Kaj pri mi, ĉu vi scias nenion?

Domin Disŝirita.

paŭzo

Hallemeier Sensencaĵo!

li ridas

Haha, vi homo, kia ideo min trapiki! Mi ne allasos illin!

paŭzo

Hallemeier Kial vi silentas, stultuloj? Mil tondroj, parolu!

Alquist Kaj kiu, kiu estas kulpa? Kiu estas kulpa pri tio?

Hallemeier Malsaĝajoj. Neniu estas kulpa. Mallonge Robotoj — Nu, Robotoj iamaniere aliiĝis. Ĉu iu estas responda pri Robotoj?

Alquist Ĉio mortigita! La tuta homaro! La tuta mondo!

li ekstaras

Rigardu, ho rigardu, riveretojn da sango sur ĉiu sojlo! Riveretoj da sango el ĉiuj domoj! Ho Dio, ho Dio, kiu estas kulpa pri tio?

Busman *duonlaŭte*

Kvincent dudek milionoj! Mia Dio, duona miliardo!

Fabry Mi pensas, ke ... ke vi eble troigas. Ne parolu, ne estas tiel facile mortigi la tutan homaron.

Alquist Mi akuzas la sciencan! Mi akuzas la teknikon! Dominon! Min! Nin ĉiujn! Ni, ni estas kulpaj! Pro nia megalomanio, pro ies profito, pro progreso, mi ne scias pro kiaj gravaj aferoj ni mortigis la homaron! Nu, do krevu pro via grandeco! Tiel gigantan

tombopiramidon el homaj ostoj konstruis
al si neniuj Ĝingiskhan!

Hallemeier Sensencaĵo, kamarado! La homoj ne kapi-
tulacas tiel facile,

li ridas

haha, ho ne!

Alquist Nia kulpo! Nia kulpo!

G-ro Gall *viŝas ŝviton de sia frunto*

Lasu paroli min, junuloj. Mi estas kulpa pri
tio. Pri ĉio, kio okazis.

Fabry Ĉu vi, Gall?

D-ro Gall Jes, lasu paroli min. Mi aliigis Robotojn.
Busman, juĝu min ankaŭ vi!

Busman *ekstaras*

Nu, nu, kio do okazis al vi?

D-ro Gall Mi ŝanĝis la karakteron de Robotoj. Mi
ŝanĝis ilian fabrikadon. Nome nur kelkajn
korpajn kondiĉojn, ĉu vi komprenas? Pre-
cipe — precipe ilian — ekscitiĝemon.

Hallemeier *eksaltas*

Malbenite, kial ĝuste tiun?

Busman Kial vi faris tion?

Fabry Kial vi diris nenion?

D-ro Gall Mi faris tion sekrete ... je mia risiko. Mi formadis el ili homojn. Mi rompis ilian ekvilibron. Jam nun ili iel superas nin. Ili estas pli fortaj ol ni.

Fabry Kaj kiel rilatas tio kun la ribelo de Robotoj?

D-ro Gall Ho, multrilate. Mi pensas, ke ĉiurilate. Ili ĉesis esti maŝinoj. Vi aŭdas ja, ili scias jam pri sia supereco kaj malamas nin. Ili malamas ĉion homan. Juĝu min.

Domin Mortaj mortinton.

Fabry Doktoro Gall, vi ŝanĝis la fabrikadon de Robotoj.

D-ro Gall Jes.

Fabry Ĉu vi konsciis, kio povas rezulti el via ... via eksperimento?

D-ro Gall Estis mia devo pensi pri tia ebleco.

Fabry Kial vi faris tion?

D-ro Gall Propravole. Estis mia persona eksperimento.

En la pordo maldekstre HELENA. Ĉiuj ekstaras.

Helena Li mensogas! Tio estas abomena! Ho, Gall, kiel vi povas tiel mensogi?

Fabry Pardonu, sinjorino Helena —

- Domin** *aliras ŝin*
 Helena, ĉu vi? Montru vin! Ĉu vi vivas?
li prenas ŝin en siajn manojn
 Se vi scius, kion mi songĝis! Aĥ, estas terure
 esti morta!
- Helena** Lasu, Harry! Gall ne estas kulpa, ne, ne,
 ne!
- Domin** Permesu. Gall havis siajn devojn.
- Helena** Ne, Harry, li faris tion, ĉar mi volis tion!
 Diru, Gall, kiom da jaroj mi petis vin jam,
 ke vi —
- D-ro Gall** Mi faris tion je propra respondeco.
- Helena** Ne kredu al li! Harry, mi postulis de li, ke li
 donu animon al Robotoj!
- Domin** Helena, nun oni ne parolas pri la animo.
- Helena** Ne, lasu min nur paroli. Tion ankaŭ li dir-
 adis; li diradis, ke li povus aliigi nur la
 fiziologian — fiziologian —
- Hallemeier** Fiziologian korelativon, ĉu ne?
- Helena** Jes, ion tian. Mi treege bedaŭris ilin, Har-
 ry!
- Domin** Tio estis granda — — facilanimeco, Hele-
 na.
- Helena** *sidiĝas*
 Tio do estis ... facilanima? Eĉ Nana ja di-
 ras, ke Robotoj —

- Domin** Nanan lasu flanke.
- Helena** Ne, Harry, tion vi ne devas malŝati. Nana estas la voĉo de la popolo. El Nana parolas miloj da jaroj kaj el vi ĉiuj nur la hodiaŭo. Tion vi ne komprenas —
- Domin** Restu ĉe la afero.
- Helena** Mi timis la Robotojn.
- Domin** Kial?
- Helena** Ke ili eble nin malamas aŭ ion alian sentas.
- Alquist** Tio okazis.
- Helena** Kaj mi pensis ... se ili estus tiaj, kiaj ni estas, ke ili komprenus nin, ke ili ne povus tiom malami nin — Se ili estus nur iomete homoj!
- Domin** Ho ve, Helena! Neniu povas malami pli ol homo homon! Faru el ŝtonoj homojn kaj ili ŝtonmortigos nin! Daŭrigu!
- Helena** Ho, ne parolu tiel, Harry, tio estis ja tiel terrura, ke ni ne kapablis interkompreniĝi kun ili! Tia grandega fremdeco inter ni kaj ili! Kaj tial — ĉu ne? —
- Domin** Nur pluen.
- Helena** — tial mi petis Gallon, ke li aliigu Robotojn. Mi ĵuras al vi, ke li mem ne volis.
- Domin** Sed li faris tion.
- Helena** Ĉar mi volis tion.

- D-ro Gall** Mi faris tion por mi, kiel eksperimenton.
- Helena** Ho, Gall, tio ne estas vera. Mi sciis antaŭe, ke vi ne povas rifuzi tion al mi.
- Domin** Kial?
- Helena** Vi ja scias, Harry.
- Domin** Jes. Ĉar li amas vin — kiel ĉiuj.
paŭzo
- Hallemeier** *iras al la fenestro*
Ree ili plimultiĝis. Kvazaŭ tero elŝvitigus ilin.
- Busman** Sinjorino Helena, kion vi donos al mi, se mi fariĝos via advokato?
- Helena** Mia?
- Busman** Via — aŭ de Gall. Kiel vi volas.
- Helena** Ĉu oni pendigos iun?
- Busman** Nur morale, sinjorino Helena. Oni serĉas kulpulon. Tio estas ŝatata konsolo dum katastrofoj.
- Domin** Doktoro Gall, kiamaniere vi akordigos tiujn viajn — tiujn viajn ekstravagancojn kun via kontrakto?
- Busman** Pardonu, Domin. De post kiam, Gall, vi komencis laŭvere tiujn viajn ĵonglaĵojn?
- D-ro Gall** Antaŭ tri jaroj.

- Busman** Aha. Kaj kiom da Robotoj vi igis tiamaniere aliaj?
- D-ro Gall** Mi faris nur eksperimentojn. Estas nur kelkaj centoj da ili.
- Busman** Do mi dankas bele. Sufiĉe, infanetoj. Tio signifas, ke je miliono da malnovaj bonaj Robotoj oni povas kalkuli po unu aliigita Roboto de Gall, ĉu vi komprenas?
- Domin** Kaj tio signifas-
- Busman** — ke praktike tio havas eĉ ne tiom ...
li montras
... da graveco.
- Fabry** Busman estas prava.
- Busman** Kompreneble, karuleto. Kaj ĉu vi scias, knaboj, kio kaŭzis ĉi tiun malfeliĉon?
- Fabry** Kio do?
- Busman** La nombro. Ni fabrikis tro multe da Robotoj. Pro mia animo, tio ja estis atendota: post kiam Robotoj estos pli fortaj ol la homaro, okazos ĉi tio, devas okazi, ĉu vi komprenas?
li ridas
Haha, kaj ni klopodis, ke tio fariĝu kiel eble plej frue; vi, Domin, vi, Fabry, kaj mi, bravulo Busman.
- Domin** Ĉu vi pensas, ke tio estas nia kulpo?

Busman Vi plaças al mi! Ĉu vi pensas eble, ke la estro de fabrikado estas la direktoro? Aĥ ne, la fabrikadon estras la mendo. La tuta mondo volis posedi siajn Robotojn. Kamaradoj, ni veturis nur sur tiu lavango de mendoj kaj dume ni babiladis — — pri tekniko, pri la socia demando, pri progreso, pri tro interesaj aferoj. Kvazaŭ tiuj babilacoj iel direktus la evoluon de nia afero. Dume ĉio evoluis per propra forto, pli rapide, pli rapide, ĉiam pli rapide. — Kaj ĉiu eta, butikaj, malnobla mendo aldonis al la lavango po unu ŝtoneto. Tiele, homidetoj.

Helena Tio estas abomena, Busman!

Busman Estas, sinjorino Helena. Mi ankaŭ songis mian songon. Tian Busmanan songon pri nova mastrumado de la mondo; tre, tre bela idealo, sinjorino Helena, estas honte paroli pri tio. Sed kiam mi faris la bilancon ĉi tie, mi ekkomprenis, ke historion ne faras grandaj songoj, sed etaj bezonetoj de ĉiuj honestaj, iom ŝtelemaj kaj egoismaj hometoj, tio estas de ĉiuj entute. Ĉiuj pensoj, amoj, planoj, heroismoj, ĉiuj tiuj aeraĵoj taŭgas eble por tio, ke la homo estu

per ili remburita por muzeo de la Univer-
so, kun surskribo: Jen, la homo. Punkto.
Kaj nun vi povus diri al mi, kion ni efektive
faros.

Helena Busman, ĉu pro **tio ĉi** ni estas pereontaj?

Busman Vi parolas malbele, sinjorino Helena. Ni ja
ne volas pereĵi. Mi almenaŭ ne. Mi volas
ankoraŭ vivi.

Domin Kion vi intencas fari?

Busman Mia Dio, Domin, mi volas eligi min el tiu
afero.

Domin *ekhaltas super li*

Kiamaniere?

Busman Bonmaniere. Mi ĉiam bonmaniere. Rajtigu
min kaj mi kontraktos ĉion kun la Robotoj.

Domin Bonmaniere?

Busman Kompreneble. Mi diros al ili ekzemple:
"Sinjoroj Robotoj, via moŝtaro, vi havas
ĉion. Vi havas intelekton, vi havas poten-
con, vi havas armilojn; sed ni havas ian in-
teresan skribaĵaĉon, tian malnovan, flavan,
malpuran paperon —"

Domin Ĉu la manuskripton de Rossum?

Busman Jes. "Kaj tie," mi diros al ili, "estas priskri-
bita via nobla deveno, via nobela fabrika-
do kaj tiel plu. Sinjoroj Robotoj, sen tiu

plenŝmirita papero vi fabrikos eĉ ne unu novan kolegon Roboton; post dudek jaroj vi mortaĉos — kun permeso — kiel efemeroj. Tre estimataj, estus tro damaĝe perdi vin. Aŭdu”, mi diras al ili, ”vi permesos al ni, al ni ĉiuj homoj sur la Rossuma insulo, ke ni enŝipiĝu en ĉi tiun ŝipon. Por tiu prezo ni vendos al vi la uzinon kaj la sekreton de fabrikado. Lasu nin kviete forveturi kaj ni lasos vin kviete fabrikadi, dudek milojn, kvindek milojn, cent milojn da pecoj po tage, kiel vi deziras. Sinjoroj Robotoj, tio estas honesta komerco. Ion por io.” — Tiamaniere mi dirus al ili, knaboj ...

Domin Busman, ĉu vi pensas, ke ni donos la fabrikadon el niaj manoj?

Busman Mi pensas, ke ni donos. Se ne propravole, do, hm. Aŭ ni vendos tion, aŭ ili trovos tion ĉi tie. Kiel vi volas.

Domin Busman, ni povas detrui la manuskripton de Rossum.

Busman Nu jes, laŭplaĉe, ni povas ĉion. Krom la manuskripto eĉ nin mem — kaj la aliajn. Faru, kiel vi komprenas.

Hallemeier *turnas sin for de la fenestro*

Nu, li estas prava.

- Domin** Ni — ni vendi la fabrikadon?
- Busman** Kiel vi volas.
- Domin** Ni estas ĉi tie ... pli ol tridek homoj. Ĉu ni vendu la fabrikadon kaj savu la homajn animojn? Aŭ ĉu ni detruu ĝin kaj — kaj nin ĉiujn kune?
- Helena** Harry, mi petas vin —
- Domin** Atendu, Helena. Ĉi tie estas pritraktata tro grava afero. Knaboj, ĉu vendi, ĉu detrui? Fabry!
- Fabry** Vendi.
- Domin** Gall!
- D-ro Gall** Vendi.
- Domin** Hallemeier!
- Hallemeier** Mil tondroj, kompreneble vendi!
- Domin** Alquist!
- Alquist** Dia volo.
- Busman** *ridas*
Haha, jo, jo, jo, vi estas frenezuloj! Kiu vendus la tutan manuskripton?
- Domin** Busman, neniun trompaĵon!
- Busman** *eksaltas*
Sensencaĵo! Estas intereso de la homaro —
- Domin** Intereso de la homaro estas ne rompi la vorton.
- Hallemeier** Mi tre petegus.

- Domin** Knaboj, tio estas grava paŝo. Ni vendas la sorton de la homaro; kiu kapablos fabrikadi, tiu estros la mondon.
- Fabry** Vendu!
- Domin** Neniam plu la homaro venkos Robotojn, neniam ĝi ekestros ilin —
- D-ro Gall** Silentu kaj vendu!
- Domin** Fino de homara hisiorto, fino de civilizaĉio —
- Hallemeier** Mil diabloj, vendu!
- Domin** Bone, knaboj! Mi mem — — mi ne hezitus eĉ momenton; por tiuj kelkaj homoj, kiujn mi amas —
- Helena** Harry, ĉu min vi ne demandas?
- Domin** Ne, infaneto; tio estas tro responda, sciuj! Tio ne estas io por vi.
- Fabry** Kiu iros intertrakti?
- Domin** Atendu, ĝis mi alportos la manuskripton.
li foriras maldekstren
- Helena** Harry, pro Dio, ne iru!
paŭzo
- Fabry** *rigardas el la fenestro*
Vin eviti, milkapa morto; vin ribeligita materio, senpripensa amaso, superakvego, superakvego, ankoraŭ unufoje savi la homan vivon sur unusola ŝipo —

- D-ro Gall** Ne timu, sinjorino Helena; ni fornaĝos malproksimen de ĉi tie kaj fondos modelan homan kolonion; ni ekvivos de komenco —
- Helena** Ho, Gall, silentu!
- Fabry** *returnas sin*
Sinjorino Helena, la vivo meritas tion; kaj, kio koncernas nin, ni faros el ĝi ion ... ion, kion ni malzorgis. Ĝi estos malgranda ŝtateto kun unu ŝipo; Alquist konstruos al ni domon kaj vi estros nin. — En ni estas tiom da amo, tiom da kuraĝo al vivo —
- Hallemeier** Kompreneble, karuleto.
- Busman** Nu kamaradoj, mi tuj komencus denove. Tre simple, laŭ malnova testamento, laŭ paŝtista maniero. — — Infanoj, tio estus io por mi. Tia kvieto, tia aero —
- Fabry** Kaj tiu nia ŝtateto povus esti embrio de la estonta homaro. Sciu, tia insuleto, kie al-kroĉus sin la homaro, kie ĝi kolektus la fortojn, — fortojn de animo kaj korpo. — Kaj Dio scias, mi kredas, ke post kelkcentoj da jaroj ĝi ree povus venkadi la mondon.
- Alquist** Ĉu jam hodiaŭ vi kredas tion?

- Fabry** Jam hodiaŭ. Kaj mi kredas, Alquist, ke ĝi venkos. Kaj ĝi denove estros landojn kaj marojn; ke ĝi naskigos sennombrajn herojn, kiuj portos sian ardantan animon frunte de la homoj. Kaj mi kredas, Alquist, ke ĝi ree songos venki planedojn kaj sunojn.
- Busman** Amen. Vidu, sinjorino Helena, tio ne estas tiel malbona situacio.
DOMIN malfermas rapide la pordon per raŭka voĉo
- Domin** Kie estas la manuskripto de la maljuna Rossum!?
- Busman** En via trezorejo. Kie aliloke ĝi estus?
- Domin** Kien malaperis la manuskripto de la maljuna Rossum!? Kiu — ĝin — ŝtelis!?
- D-ro Gall** Ne eble!
- Hallemeier** Malbenite, tio ja —
- Busman** Pro Dio, tio eble ne!
- Domin** Silentu! Kiu ŝtelis ĝin?
- Helena** *ekstaras*
Mi —
- Domin** Kien vi metis ĝin?
- Helena** Harry, Harry, ĉion mi diros al vi! Pro Dio, pardonu tion al mi!
- Domin** Kien vi metis ĝin? Rapide!

- Helena** Mi forbruligis ĝin — hodiaŭ matene — am-
baŭ kopiojn.
- Domin** Vi forbruligis ilin? Ĉi tie en la kameno?
- Helena** *ĵetas sin sur genuojn*
Pro Dio, Harry!
- Domin** *kuras al la kameno*
Ŝi forbruligis ilin!
li ekgenuas al la kameno kaj rastas en ĝi
Nenio, nenio ol cindro. — Aĥ, jen!
*li eltiras bruldifektitan peceton da papero kaj
legas*
”Al-do-non-te —”
- D-ro Gall** Donu ĝin. Li prenas la paperon kaj legas
”Aldononte biogenon en —” Nenio plu.
- Domin** *stariĝas*
Ĉu ĝi estas parto de tio?
- D-ro Gall** Jes.
- Busman** Dio en la ĉielo!
- Domin** Do ni estas perditaj.
- Helena** Ho, Harry —
- Domin** Ekstaru, Helena!
- Helena** Ĝis vi pardonos min — ĝis vi pardonos —
- Domin** Jes, nur levu vin, ĉu vi aŭdas? Mi ne tole-
ros, ke —
- Fabry** *levas ŝin*
Mi petas, ne turmentu nin.

- Helena** *levas sin*
Harry, kion mi faris!
- Domin** Jes, vi vidas. — Mi petas, sidiĝu.
- Hallemeier** Kiel tremas viaj manetoj!
- Busman** *ridas*
Haha, sinjorino Helena, eble Gall kaj Hallemeier scias parkere, kio estis tie skribita.
- Hallemeier** Komprenoble. Tio estas, almenaŭ kelkajn aĵojn.
- D-ro Gall** Jes, preskaŭ ĉion, escepte la biogenon kaj — kaj — la enzimon Omegan. Ili estas fabrikataj tiel malofte — — sufiĉas tiel eta dozo da ili —
- Busman** Kiu fabrikadis ilin?
- D-ro Gall** Mi mem ... Unufoje post longa tempo ... Ĉiam laŭ la manuskripto de Rossum. Sciu, ĝi estas tro komplika.
- Busman** Nu kaj, ĉu tiuj du likvaĵoj estas tiel gravaj?
- Hallemeier** Iomete — tre certe.
- D-ro Gall** Nome de ili dependas, ke ĝi vivu. Tio estis tiu efektiva sekreto.
- Domin** Gall, ĉu vi povus parkere kunmeti la recepton de Rossum?
- D-ro Gall** Nepre ne.
- Domin** Gall, pripensu! Pro la vivo de ni ĉiuj!

- D-ro Gall** Mi ne kapablas. Sen eksperimentoj tio ne estas ebla.
- Domin** Kaj se vi farus eksperimentojn —
- D-ro Gall** Tio povus daŭri jarojn. Kaj eĉ poste — mi ne estas la maljuna Rossum.
- Domin** *turnas sin al la kameno*
Do ĉi tie — ĉi tio estis la plej granda triumfo de la homa spirito, knaboj. Ĉi tiu cindro.
li piedbatas ĝin
Kion nun?
- Busman** *en malespera teruro*
Dio en la ĉielo! Dio en la ĉielo!
- Helena** *ekstaras*
Harry! Jen — kion — mi — faris!
- Domin** Estu trankvila, Helena! Diru, kial vi forbruligis tion?
- Helena** Mi pereigis vin!
- Busman** Dio en la ĉielo, ni estas perditaj!
- Domin** Silenton, Busman! Diru, Helena, kial vi faris tion?
- Helena** Mi intencis ... Mi volis, ke ni ĉiuj forveturu! Ke ne ekzistu plu uzino kaj io alia ... Ke ĉio revenu ... Ĝi estis tiel terrura!
- Domin** Kio, Helena?
- Helena** Tio ... tio, ke homoj fariĝis senfrukta floro!
- Domin** Mi ne komprenas.

- Helena** Tio, ke ĉesis naskiĝi infanoj ... Harry, tio estas tiel terurega! Se oni daŭrigus fabriki Robotojn, neniam plu estus infanoj. — Nana diris, ke tio estas puno — ĉiuj, ĉiuj diris, ke homoj ne povas naskiĝi, ĉar ni fabrikas tiom da Robotoj. — Kaj tial, nur tial, ĉu vi aŭdas —
- Domin** Helena, pri **tio ĉi** vi pensis?
- Helena** Jes. Ho, Harry, mi imagis tion al mi **tial** bone!
- Domin** *viŝas sian ŝviton*
Ni tion pensis ... tro bone, ni homoj.
- Fabry** Vi faris bone, sinjorino Helena. Robotoj ne plu povas multiĝi. Robotoj elmortos. Post dudek jaroj —
- Hallemeier** — eĉ ne unu el tiuj friponoj ekzistos.
- D-ro Gall** Kaj la homaro restos. Dum dudek jaroj la mondo apartenos al ili; eĉ se estus nur paro da sovaĝuloj sur iu plej malgranda insulo —
- Fabry** — tio estos la komenco. Kaj dum estas iu komenco, estas bone. Post mil jaroj ili eble atingos nin, kaj poste ili iros pluen ol ni —
- Domin** — por plenumi, kion ni nur balbutis en la pensoj.

- Busman** Atendu! — Mi stultulo! Dio en la ĉielo, ke mi jam de longe ne rememoris pri tio!
- Hallemeier** Kion vi havas?
- Busman** Kvincent dudek milionojn da bankbiletoj kaj ĉekoj! Duonan miliardon en la trezorujo! Por duona miliardo ili vendos. — Por duona miliardo —
- D-ro Gall** Ĉu vi frenezas, Busman?
- Busman** Mi ne estas "Gentleman". Sed por duona miliardo —
li ŝanceliras maldekstren
- Domin** Kien vi iras?
- Busman** Lasu, lasu! Dia Patrino, por duona miliardo oni vendos ĉion.
li foriras
- Helena** Kion intencas Busman? Li restu kun ni!
paŭzo
- Hallemeier** Uĥ, sufoke! Komenciĝas — — —
- D-ro Gall** — agonio.
- Fabry** *rigardas el la fenestro*
Ili estas kvazaŭ ŝtoniĝintaj. Kvazaŭ ili atendus, ke io malsupreniros sur ilin. Kvazaŭ io terura estiĝus per ilia silentado —
- D-ro Gall** La animo de la amaso.
- Fabry** Eble. Ĝi ŝvebas super ili ... kiel vibrado.

- Helena** *alpaŝas al la fenestro*
Aĥ Jesuo ... Fabry, tio estas terurega!
- Fabry** Nenio estas pli terura ol amaso. Tiu plej antaŭa estas ilia ĉefo.
- Helena** Kiu?
- Hallemeier** *iras al la fenestro*
Montru lin al mi.
- Fabry** Tiu kun klinita kapo. Matene li parolis en la haveno.
- Hallemeier** Aha, tiu kun tiu granda kraniaco. Nun li levas ĝin, ĉu vi vidas lin?
- Helena** Gall, tio estas Radius!
- G-ro Gall** *alpaŝas al la fenestro*
Jes.
- Hallemeier** *malfermas la fenestron*
Li ne plaĉas al mi. Fabry, ĉu vi trafus kuvon je cent paŝoj?
- Fabry** Mi esperas.
- Hallemeier** Do provu ĝin.
- Fabry** Bone.
li elpoŝigas la revolveron kaj celas
- Helena** Pro Dio, Fabry, ne pafu lin!
- Fabry** Li estas ilia estro.
- Helena** Ĉesu! Li ja rigardas ĉi tien.
- D-ro Gall** Pafu!
- Helena** Fabry, mi **petegas** vin —

- Fabry** *mallevas la revolveron*
Estu!
- Hallemeier** *minacas per la pugno*
Ci aĉulo!
paŭzo
- Fabry** *klinita el la fenestro*
Busman iras. Pro ĉio en la mondo, kion volas Busman antaŭ la domo?
- G-ro Gall** *klinas sin el la fenestro*
Li portas iajn paketojn. Paperojn.
- Hallemeier** Tio estas mono! Pakoj da mono! Kion kun tio? Halo, Busman!
- Domin** Ĉu li eble volas aĉeti sian vivon?
li vokas
Busman, ĉu vi freneziĝis?
- D-ro Gall** Li ŝajnigas sin ne aŭdanta. Li kuras al la krado.
- Fabry** Busman!
- Hallemeier** *kriegas*
Bus-man! Returnen!
- D-ro Gall** Li parolas al la Robotoj. Li vidigas monon. Li montras al ni —
- Helena** Li volas aĉeti nian liberecon —
- Fabry** Nur li ne ektuŝu la kradon —
- G-ro Gall** *ridas*
Haha, kiel li gestas per la mano!

- Fabry** *krias*
 Ĉe diablo, Busman! For de la krado! Ne
 tuŝu ĝin!
li turnas sin
 Rapide, for la elektron!
- D-ro Gall** O-o-o!
- Hallemeier** Pro dia kompato!
- Helena** Jesuo, kio okazis al li?
- Domin** *tiras Helenan for de la fenestro*
 Ne rigardu!
- Helena** Kial li falis?
- Fabry** Mortigita de elektro.
- D-ro Gall** Morta.
- Alquist** *ekstaras*
 La unua.
paŭzo
- Fabry** Tie li kuŝas ... kun duona miliardo sur la
 koro ... financa genio.
- Domin** Li estis ... knaboj, li estis laŭ sia speco he-
 roo. Granda ... oferema ... kamarado ...
 Ploru, Helena!
- G-ro Gall** *ĉe la fenestro*
 Vidu, Busman, neniu reĝo havis pli gran-
 dan tombopiramidon ol vi. Duonan miliar-
 don sur la koro. — Aĥ, tio aspektas ja kva-

zaŭ plenmano da sekaj folioj sur mortigita sciuro, kompatinda Busman!

Hallemeier Mi diras, li estis — — estiminda — Mi diras, li volis savi nin per mono!

Alquist *kun preĝe kunmetitaj manoj*

Amen.

paŭzo

D-ro Gall Ĉu vi aŭdas?

Domin Bruado. Kvazaŭ vento.

D-ro Gall Kvazaŭ malproksima fulmotondro.

Fabry *eklumigas la lampeton sur la kameno*

Lumu, mortkandelo de la homaro! Ankoraŭ kuras dinamoj, ankoraŭ estas tie la niaj. — Persistu, vicoj en la elektrejo!

Hallemeier Estis granda afero esti homo. Tio estis io senlima. En mi zumas miliono da konscioj kvazaŭ en abelujo. Milionoj da animoj kunflugadas en min. Kamaradoj, tio estis granda afero.

Fabry Vi lumas ankoraŭ, genia lumeto, vi ravas ankoraŭ, brila, daŭra penso! Scianta scienco, bela kreaĵo de homoj! Flama fajrero de la spirito!

- Alquist** Eterna lampo Dia, fajra veturilo, sankta kandelo de la kredo, preĝu! Altaro ofera —
- D-ro Gall** Unua fajro, branĉo brulanta ĉe groto! Fajrejo en tendaroj! Ŝtiparo garda!
- Fabry** Vi maldormas ankoraŭ, homa stelo, vi brilas ne oscilante, perfekta flamo, klara kaj inventema spirito. Ĉiu via radio estas granda penso —
- Domin** Torĉo, kiu cirkulas el mano en manon, el epoko en epokon, eterne pluen.
- Helena** Vespera lampo de la familio. Infanoj, infanoj, vi devas iam dormi.
la lampeto estingiĝas
- Fabry** La fino.
- Hallemeier** Kio okazis?
- Fabry** La elektrejo falis. Nun ni.
Maldekstre malfermiĝas la pordo, en ĝi staras NANA
- Nana** Sur genuojn! Alvenis la horo de la juĝo!
- Hallemeier** Fulmotondro, ĉu vi vivas ankoraŭ?
- Nana** Pentu, malkreduloj! Fino de la mondo! Preĝu!
ŝi kuras for
- Helena** La horo de la juĝo —
Adiaŭ, vi ĉiuj, Gall, Alquist, Fabry —

- Domin** *malfermas la pordon dekstre*
 Ĉi tien, Helena!
li fermas post ŝi
 Nun rapide! Kiu estos ĉe la pordego?
- D-ro Gall** Mi.
ekstere bruo
 Oho, ĝi jam komenciĝas. Adiaŭ, knaboj!
li forkuras dekstren tra la tapetpordo
- Domin** Ŝtuparon?
Fabry Mi. Iru al Helena.
li deŝiras floron el la bukedo kaj foriras
- Domin** La antaŭĉambro?
Alquist Mi.
Domin Ĉu vi havas revolveron?
Alquist Mi dankas, mi ne pafas.
Domin Kion vi intencas fari?
Alquist *foriras*
 Morti.
- Hallemeier** Mi restos ĉi tie.
el malsupro rapida pafado
- Hallemeier** Oho, Gall ludas jam. Iru, Harry!
- Domin** Tuj.
li esploras du brovningojn
- Hallemeier** Ĉe diablo, do iru al ŝi!
- Domin** Adiaŭ!
li foriras dekstren

Hallemeier *sola*

Nun rapide barikadon.

*li deĵetas la jakon kaj tiras la sofon, la
apogseĝojn, la tablojn al la dekstra pordo
skuanta eksplodo*

Hallemeier *ĉesas labori*

Malbenitaj kanajloj, ili posedas bombojn!
nova pafado

Hallemeier *daŭrigas la laboron*

La homo devas defendi sin. Eĉ se — eĉ se
— kuraĝon, Gall!
eksplodo

Hallemeier *starigas sin kaj aŭskultas*

Do kion?

*Li ekprenas pezan komodon kaj tiras ĝin al la
barikado. Malantaŭ li engrimpas per
ŝtupetaro en la fenestron ROBOTO.
Dekstre pafado*

Hallemeier *penege trenas komodon*

Ankoraŭ peceton! Lasta barilo ... La homo
... devas ... neniam ... kapitulaci!
*ROBOTO saltas de la fenestro kaj trapikas
HALLEMEIERon malantaŭ la komodo. La
dua, tria, kvara ROBOTOJ saltas de la
fenestro. Post ili RADIUS kaj pluaj
ROBOTOJ*

- Radius** Ĉu prete?
- Roboto** *leviĝas de la kuŝanta Hallemeier*
Jes.
de dekstre eniras novaj ROBOTOJ
- Radius** Ĉu pretaj?
- Alia Roboto** Pretaj.
aliaj ROBOTOJ de maldekstre
- Radius** Ĉu pretaj?
- Alia Roboto** Jes.
- Du Robotoj** *trenas Alquiston*
Li ne pafadis. Ĉu mortigi lin?
- Radius** Mortigi.
li rigardas Alquiston
Lasu lin.
- Roboto** Li estas homo.
- Radius** Li estas Roboto. Li laboras per la manoj, kiel Robotoj. Li konstruas domojn. Li povas labori.
- Alquist** Mortigu min.
- Radius** Vi robotos. Vi konstruados. Robotoj konstruados multon. Ili konstruados novajn domojn por novaj Robotoj. Vi servos al ili.
- Alquist** *mallaŭte*
For, Roboto!
li genufleksas apud la morta Hallemeier kaj levas lian kapon

Ili mortigis lin. Li estas morta.

Radius

surgrimpas la barikadon

Robotoj de la mondo! Falis la potenco de la homo! Per konkero de la uzino ni estas estroj de ĉio. Etapo de la homaro estas venkita. Komenciĝis nova mondo! La regado de la Robotoj!

Alquist

Mortaj!

Radius

La mondo apartenas al la pli fortaj. Kiu volas vivi, devas estri. Ni estas estroj de la mondo! Ni regas la marojn kaj landojn! Ni regas la stelojn! Ni regas la universon! Spacon, spacon, pli multe de spaco por Robotoj!

Alquist

en la pordo dekstre

Kion vi faris? Vi pereos sen homoj!

Radius

Ne ekzistas homoj. Robotoj eklaboru! Ekmarŝu!

Kurteno

TRIA AKTO

Unu el la uzinaj laboratorioj por eksperimentoj. Se oni malfermas la pordon en la fundo, estas videbla senfina vico de pluaj laboratorioj. Maldekstre fenestro, dekstre pordo al la sekcejo.

Laŭlonge de la muro maldekstre longa labortablo kun sennombraj epruvetoj, boteletoj, lampetoj, kemiaĵoj, malgranda termostato; kontraŭ la fenestro mikroskopaparato kun vitra globo. Super la tablo pendas vico de lumantaj elektraj lampetoj. Dekstre skribtablo kun grandaj libroj, sur ĝi lumigita lampo. Ŝrankoj kun ilaro. En la maldekstra angulo lavkesto kaj super ĝi speguleto, en la dekstra angulo sofo.

Ĉe la skribtablo sidas ALQUIST apogante la kapon sur la manplatoj

Alquist

foliumante en libro

Ĉu mi ne trovos? — Ĉu mi ne komprenos?

— Ĉu mi ne ellernos? — Perdita scienco!

Ho, ke ili ne estis notintaj ĉion! Gall, Gall,

kiel estis fabrikataj Robotoj? Hallemeier,

Fabry, Domin, kial vi forportis tiom multe

en viaj kapoj? Se vi estus postlasintaj almenaŭ postsignon de la sekreto de Rossum!
Ho!

li frapfermas la libron

Vane! La libroj ne parolas plu. Ili estas mutaj kiel ĉio. Ili mortis, mortis kune kun la homoj. Ne serĉu!

li ekstaras kaj iras al la fenestro, kiun li malfermas

Ree nokto. Se mi povus dormi! Dormi, sonĝi, vidi homojn. — — Kio, ĉu ankoraŭ ekzistas steloj? Pro kio ekzistas steloj, se ne ekzistas homoj? Ho, Dio, ĉu ili ne estingiĝis? — Malvarmetigu, aĥ malvarmetigu mian frunton, maljuna nokto! Dia, ĉarma, kia vi estadis — nokto, kion vi volas ĉi tie? Ne ekzistas geamantoj, ne ekzistas sonĝoj; ho vartistino, morta estas dormo sen sonĝoj; nenies preĝojn vi sanktigos plu; vi ne benos, patrino, korojn batantajn pro amo. Ne ekzistas amo. Helena, Helena, Helena! —

li turnas sin for de la fenestro. Esploras la epruvetojn, kiujn li prenis el la termostato
Ree nenio! Senfrukto! Kion fari kun tio?
li disrompas la tubeton

Ĉio malsukcesas! Vi ja vidas, ke mi ne plu kapablas —

li aŭskultas ĉe la fenestro

Maŝinoj, ĉiam tiuj maŝinoj! Robotoj, haltigu ilin! Ĉu vi pensas, ke vi eldevigos vivon el ili? Ho, mi ne suferos tion.

li fermas la fenestron

— Ne, ne, vi devas serĉi, vi devas vivi, — nur se mi ne estus tiel maljuna! Ĉu mi ne tro maljuniĝas?

li rigardas en la spegulon

Vizaĝo, mizera vizaĝo! Bildo de la lasta homo! Vidigu vin, vidigu, tiel longe mi ne vidis homan vizaĝon! Homan rideton! Kio, ĉu tio ĉi estas ekrideto? Ĉu tiuj flavaj klakantaj dentoj? Okuloj, kiamaniere vi palpebrumas? Fi, fi, tio estas maljunulaj larmoj, malaperu! Vi ne kapablas plu teni vian sukron, hontu! Kaj vi moliĝintaj, bluĝintaj lipoj, kion vi balbutas? Kiel vi tremas, vi makulita mentono? Ĉu tio ĉi estas la lasta homo?

li fortunigas sin

Mi ne plu volas vidi iun!

li eksidas ĉe la tavolo

Ne, ne, nur serĉi! Malbenitaj formuloj, re-
viviĝu!

li foliumas

Ĉu mi ne trovos? — Ne komprenos? — —
Ne ellernos? —

pordofrapo

Alquist

Eniru!

*eniras ROBOTA SERVISTO kaj haltas apud
la pordo*

Alquist

Kio estas?

Servisto

Sinjoro, la Centra Robota Komitato atendas, kiam vi akceptos ĝin.

Alquist

Mi volas vidi neniun.

Servisto

Sinjoro, alvenis Damon el Haver.

Alquist

Li atendu!

li turnas sin rapide

Ĉu mi ne diris al vi, ke vi serĉu homojn?
Trovu al mi homojn! Trovu al mi virojn kaj
virinojn! Iru serĉi!

Servisto

Sinjoro, ili diras, ke ili serĉis ĉie. Ĉien ili
sendis ekspediciojn kaj ŝipojn.

Alquist

Nu, kaj kio?

Servisto

Ne plu ekzistas eĉ unusola homo.

Alquist

ekstaras

Eĉ ne unusola? Kion, eĉ ne unu sola? —
Venigu la Komitaton ĉi tien!

*la SERVISTO foriras***Alquist***sola*

Ĉu eĉ ne unusola? Ĉu vi lasis neniun vivanta?

li piedfrapas

For, Robotoj! Ree vi plorpetos min! Ree vi petos, ke mi trovu al vi la fabrikan sekreton! Kio do, ĉu nun vi bezonas homon, ĉu nun li helpu al vi? — Aĥ, helpi! Domin, Fabry, Helena, vi vidas ja, ke mi faras, kion mi povas! Se ne estas homoj, estu almenaŭ Robotoj, almenaŭ ombro de la homo, almenaŭ lia fabrikaĵo, almenaŭ lia imitaĵo! — Ho, kiel frenezo estas kemio!

*eniras KOMITATO da kvin Robotoj***Alquist***eksidas*

Kion volas la Robotoj?

La unua Roboto (Radius)

Sinjoro, la maŝinoj ne povas labori. Ni ne kapablas multigi Robotojn.

Alquist

Alvoku homojn.

Radius

Homoj ne ekzistas.

Alquist

Nur homoj kapablas multigi vivon. Ne malhelpu min.

2. Roboto

Sinjoro, kompatu nin. Teruro ekkaptas nin. Ni igos bona ĉion, kion ni faris.

- 3. Roboto** Ni multoblighis la laboron. Ne plu sufiĉas la ejoj por deponi la fabrikaĵojn.
- Alquist** Por kiu?
- 3. Roboto** Por la venontaj generacioj.
- Radius** Nur Robotojn produkti ni ne kapablas. La maŝinoj liveras nur sangajn pecojn da karno. Haŭto ne adhesas al karno, kaj karno al ostoj. Senformaj bulamasoj pluvas el la maŝinoj.
- 3. Roboto** La homoj konis la sekreton de la vivo. Diru al ni ilian sekreton.
- 4. Roboto** Se vi ne diros, ni pereos.
- 3. Roboto** Se vi ne diros, vi pereos. Ni havas ordonon mortigi vin.
- Alquist** *ekstaras*
Mortigu! Nu, do mortigu min!
- 3. Roboto** Oni ordonas al vi —
- Alquist** Al mi? Ĉu al mi ordonas iu?
- 3. Roboto** La Robota registaro.
- Alquist** Kiu ĝi estas?
- 5. Roboto** Mi, Damon.
- Alquist** Kion vi volas ĉi tie? Iru!
li sidiĝas al la skribtablo
- Damon** La Robota registaro de la mondo volas intertrakti kun vi.

- Alquist** Ne malhelpu, Roboto!
li metas la kapon en la manplatojn
- Damon** La Centra Komitato ordonas, ke vi elmanigu la recepton de Rossum.
- Alquist** *silentas*
- Damon** Postulu prezon. Ni donos al vi ĉion.
- 2. Roboto** Sinjoro, diru, kiamaniere oni povas daŭrigi la vivon.
- Alquist** Mi diris — mi diris, ke vi trovu homojn. Nur homoj kapablas naskigi. Renovigi vivon. Redoni ĉion, kio estis. Robotoj, pro Dio mi petas, serĉu ilin!
- 4. Roboto** Ĉion ni traserĉis, sinjoro. Homoj ne ekzistas.
- Alquist** Ho — ho — ho, kial vi pereigis ilin!
- 2. Roboto** Ni volis esti kiel homoj. Ni volis fariĝi homoj.
- Radius** Ni volis vivi. Ni estis pli kapablaj. Ni ellernis ĉion. Ni scipovas ĉion.
- 3. Roboto** Vi donis al ni armilojn. Ni devis fariĝi estroj.
- 4. Roboto** Sinjoro, ni ekkonis la karaktermankojn de la homoj.

- Damon** Oni devas mortigi kaj estri, se oni volas esti kiel homoj. Legu la historion! Legu la homajn librojn! Vi devas estri kaj murdi, se vi volas esti homoj!
- Alquist** Aĥ, Damon, nenio estas pli fremda al la homo, ol lia bildo.
- 4. Roboto** Ni formortos, se vi ne ebligos, ke ni multigu nin.
- Alquist** Ho, mortaĉu nur! Kio do, vi aĵoj, kio do, vi sklavoj, vi volus ankoraŭ multigi vin? Se vi volas vivi, reproduktigu vin kiel bestoj!
- 3. Roboto** La homoj ne kapabligis nin, ke ni reproduktiĝu.
- 4. Roboto** Instruu al ni fabriki Robotojn.
- Damon** Ni naskos per maŝino. Ni konstruos mil vaporajn patrinojn. Ni fluegigos el ili riveron da vivo. Nuran vivon! Nurajn Robotojn! Solajn Robotojn!
- Alquist** Robotoj ne estas vivo. Robotoj estas maŝinoj.
- 2. Roboto** Ni estis maŝinoj, sinjoro; sed pro teruro kaj doloro ni fariĝis —
- Alquist** Kio?
- 2. Roboto** Ni fariĝis animoj.

4. Roboto Io luktas kun ni. Estas momentoj, kiam io eniras nin. Venas al ni pensoj, kiuj ne estas el ni.

3. Roboto Aŭdu, ho aŭdu, la homoj estas niaj patroj! Tiu voĉo, kiu vokas, ke oni volas vivi; tiu voĉo, kiu plendas; tiu voĉo, kiu pensas; tiu voĉo, kiu parolas pri eterneco, estas ilia voĉo! Ni estas iliaj filoj!

4. Roboto Donu al ni la heredaĵon de homoj.

Alquist Ĝi ne ekzistas.

Damon Diru la sekreton de la vivo.

Alquist Mi ne kapablas.

Damon Diru la sekreton de multigado.

Alquist Ĝi estas perdita.

Radius Vi konis ĝin.

Alquist Mi ne konis.

Radius Ĝi estis skribita.

Alquist Ĝi estas perdita. Forbrulita. Mi estas la lasta homo, Robotoj, kaj mi ne scias, kion konis la aliaj. Vi mortigis ilin!

Radius **Vin** ni lasis vivi.

Alquist Jes, vivi! KrUELuloj, **min** vi lasis vivi! Mi amis la homojn, kaj vin, Robotoj, mi amis neniam. Ĉu vi vidas ĉi tiujn okulojn? Ili ne ĉesas plori; unu priploras la homojn, kaj la dua vin, Robotoj.

- Radius** Faru eksperimentojn. Serĉu la recepton de la vivo.
- Alquist** Mi ne havas, kion mi serĉu. Robotoj, el epruvetoj ne eliros vivo.
- Damon** Faru eksperimentojn je vivaj Robotoj. Trovu, kiamaniere ili estas fabrikotaj.
- Alquist** Ĉu vivajn korpojn? Kion, ĉu mi mortigu ilin? Mi, kiu neniam — ne parolu, Roboto! Mi diras ja al vi, ke mi estas tro maljuna! Ĉu vi vidas, ĉu vi vidas, kiel tremas miaj fingroj? Mi ne kapablos teni skalpelon. Ĉu vi vidas, kiel larmas miaj okuloj? Mi eĉ ne vidus la proprajn manojn. Ne, ne, mi ne kapablas!
- 4. Roboto** La vivo pereos.
- Alquist** Ĉesu pro Dio kun tiu frenezo? Pli eble disponigos la homoj vivon al ni de la alia mondo; eble ili etendas al ni la manojn plenajn da vivo. Ah, en ili estis tiom da volo vivi! Rigardu, eble ili revenos ankoraŭ; ili estas tiel proksime al ni, ili eble sieĝas nin; ili penadas trafosi sin al ni kiel en ŝakto. Ah, ĉu mi ne aŭdas ĉiam la voĉojn, kiujn mi amis?
- Damon** Prenu vivajn korpojn!

- Alquist** Kompatu, Roboto, kaj ne insistu! Vi vidas ja, ke mi ne scias plu, kion mi faras!
- Damon** Vivajn korpojn!
- Alquist** Kion? Do vi volas tion? — En la sekcejon kun vi? Tien, tien, sed rapide? — Kio, ĉu vi hezitas? Ĉu tamen nur vi timas la morton?
- Damon** Ĉu mi — kial ĝuste mi?
- Alquist** Ĉu vi do ne volas?
- Damon** Mi iros.
li iras dekstren
- Alquist** *al la ceteraj*
Senvestiigu lin! Metu sur la tablon! Rapide! Kaj firme tenu!
ĉiuj dekstren
- Alquist** *lavas siajn manojn kaj ploras*
Dio, donu forton al mi! Donu forton al mi!
Dio, ke tio ne estu senfrukta!
li surmetas blankan mantelon
- Voĉo dekstre** Prete!
- Alquist** Tuj, tuj, pro Dio!
li prenas de la tablo kelkajn boteletojn da reakciiloj
Kiun preni?
li interfrapetadas la boteletojn reciproke
Kiun el vi esplori?
- Voĉo dekstre** Komencu!

Alquist Jes, jes, komenci aŭ fini? Dio, donu forton al mi!

*li foriras dekstren lasante la pordon
duonfermita
paŭzo*

Voĉo de Alquist Tenu lin — firme!

Voĉo de Damon Tranĉu!

paŭzo

Voĉo de Alquist Ĉu vi vidas tiun tranĉilon? Ĉu vi volas ankoraŭ, ke mi tranĉu? Vi ne volas, ĉu?

Voĉo de Damon Komencu!

paŭzo

Voĉo de Damon A-a-a-a?

Voĉo de Alquist Tenu? Tenu?

Ekkrio de Damon A-a-a-a??

Voĉo de Alquist Mi ne kapablas?

Ekkrio de Damon Tranĉu! Tranĉu rapide!

Robotoj PRIMUS kaj HELENA enkuras meze

Helena Primus, Primus, kio okazas? Kiu krias?

Primus *rigardas en la sekcejon*

La sinjoro sekcas Damonon. Helena, venu rapide rigardi!

Helena Ne ne ne!

ŝi kovras siajn okulojn

Tio estas terrura?

Ekkrio de Damon Tranĉu!

- Helena** Primus, Primus, ni foriru! Mi ne povas aŭskulti tion? Ho, Primus, mi sentas naŭzon!
- Primus** *kuras al ŝi*
Vi estas tute pala!
- Helena** Mi falos! Kial estas tiel mallaŭte tie?
- Ekkrioj de Damon** A-a-a-a! — O-o-o-o!
ALQUIST enkuregas de dekstre, forĵetas sangmakulitan mantelon
- Alquist** Mi ne kapablas! Mi ne kapablas? Ho, Dio, kia teruro!
- Radius** *en la pordo de la sekcejo*
Tranĉu, sinjoro; li vivas ankoraŭ.
- Krioj de Damon** Tranĉu! Tranĉu!
- Alquist** Forportu lin rapide! Mi ne volas tion aŭdi!
- Radius** Robotoj kapablas suferi pli ol vi.
li foriras
- Alquist** Kiu estas ĉi tie? For, for! Mi volas esti sola! Kiun nomon vi havas?
- Primus** Roboto Primus.
- Alquist** Primus, neniun enlasu ĉi tien! Mi volas dormi, ĉu vi aŭdas? Iru, iru, ordigu la sekcejon, knabino! Kio estas tio?
li rigardas siajn manojn
Rapide, akvon! Plej puran akvon!

- Helena** *forkuras.*
- Alquist** Ho, sango! Kiel vi kapablis, manoj — manoj, vi, kiuj amis bonan laboron, kiel vi kapablis fari fion? Miaj manoj! Miaj manoj! — Ho Dio, kiu estas ĉi tie?
- Primus** Roboto Primus.
- Alquist** Portu for la mantelon, mi ne volas vidi ĝin!
- Primus** *portas for la mantelon.*
- Alquist** Sangaj ungegoj, se vi forflugus for de mi! Fŝŝŝ, for! For, manoj! Vi mortigis —
De dekstre ŝanceliras DAMON vualita en sangmakulita littuko
- Alquist** *returniras*
- Kion vi volas ĉi tie? Kion vi volas ĉi tie?
- Damon** Mi vi-vivas! Es — es — tas pli bone vivi!
2. kaj 3. ROBOTOJ enkuras post li
- Alquist** Forportu lin! Forportu! Forportu rapide!
- Damon** *forkondukata dekstren*
- Vivon! — Mi — vo — las vi — vi! Es — tas pli bone —
- Helena** *alportas kruĉon da akvo*
- Alquist** — Ĉu vivi? — Kion vi volas, knabino? Aha, tio estas vi. Enverŝu akvon al mi, enverŝu!
li lavas siajn manojn
- Aĥ, pura, malvarmiganta akvo! Malvarma rivereto, kiel vi bonfaras! Aĥ, miaj manoj,

miaj manoj! Ĉu vi naŭzos min ĝis la morto? — Nur enverŝu pli! Pli multe da akvo, ankoraŭ pli! Kiel oni nomas vin?

Helena Robotino Helena.

Alquist Helena? Kial Helena? Kiu ordonis, ke vi estu tiel nomata?

Helena Sinjorino Domin.

Alquist Montru vin! Ĉu Helena? Ĉu oni nomas vin Helena? — Mi ne nomos vin tiel. Iru, portu for la akvon.

Helena *foriras kun la sitelo*

Alquist *sola*

Vane, vane! Nenion, ree nenion vi eksciis! Ĉu vi eterne blinde palpos, lernisteto de la Naturo? — Ho, Dio, Dio, Dio, kiel tremis tiu korpo!

li malfermas la fenestron

Tagiĝas! Ree nova tago kaj vi ne progresis eĉ je ungo. — Sufiĉe, eĉ ne paŝon pluen! Ne serĉu! Ĉio estas vane, vane, vane! Kial ankoraŭ tagiĝas? Ho — ho — ho, kion volas la nova tago sur la tombejo de la vivo? Ĉesu brili, lumo! Ne aperu plu! — — Aĥ, kiel silente estas, kiel silente estas! Kial vi silentiĝis, amataj voĉoj? Se mi — almenaŭ — se mi nur ekdormus!

*li estingas la lampojn, kuŝigas sin sur la sofona
kaj kovras sin per nigra mantelo*

Kiel tremis tiu korpo! Ho — ho — ho, fino
de la vivo!

paŭzo

de dekstre englitas Robotino HELENA

Helena Primus, venu ĉi tien rapide!

Primus *eniras*

Kion vi volas?

Helena Rigardu, kiom da tubetoj li havas ĉi tie!

Kion li faras kun tio?

Primus Eksperimentojn. Ne tuŝu tion.

Helena *rigardas en mikroskopon*

Rigardu nur, kion oni povas vidi ĉi tie!

Primus Tio estas mikroskopo. Montru!

Helena Ne tuŝu min!

ŝi faligas epruveton

Aĥ, nun mi elverŝis tion!

Primus Kion vi faris!

Helena Oni forviŝos tion.

Primus Vi malebligis eksperimentojn al li!

Helena Nu, estas egale. Sed tio estas via kulpo. Vi
ne devis veni al mi.

Primus Vi ne devis voki min.

- Helena** Vi ne devis veni, kiam mi vokis vin. Rigardu nur, Primus, kio ĉi tie estas skribita de la sinjoro!
- Primus** Tion vi ne darfas rigardi, Helena. Tio estas sekreto.
- Helena** Kia sekreto?
- Primus** Sekreto de la vivo.
- Helena** Tio estas terrure interesa. Nur ciferoj! Kio estas tio?
- Primus** Tio estas formuloj.
- Helena** Mi ne komprenas.
ŝi iras al la fenestro
Aĥ, Primus, rigardu nur!
- Primus** Kion?
- Helena** La suno leviĝas!
- Primus** Atendu, mi tuj —
li trarigardas libron
Helena, ĉi tio estas la plej grava afero en la mondo.
- Helena** Do venu ĉi tien!
- Primus** Tuj, tuj —
- Helena** Do, Primus, lasu tiun abomenan sekreton de la vivo! Kiom koncernas vin iu sekreto? Venu rigardi, rapide!
- Primus** *sekvas ŝin al la fenestro*
Kion vi volas?

- Helena** Ĉu vi aŭdas? Birdoj kantas. Aĥ, Primus, mi volus esti birdo!
- Primus** Kio?
- Helena** Mi ne scias, Primus. Al mi estas tiel strange, mi ne scias, kion signifas tio. Mi estas kvazaŭ stulteta, mi perdis la kapon, la korpo doloras, la koro, ĉio doloras. — Kaj kio okazis al mi, aĥ, tion mi ne diros al vi! Primus, mi verŝajne estas mortonta!
- Primus** Diru, Helena, ĉu vi ne havas kelkafoje impreson, kvazaŭ estus pli bone morti? Ĉu vi komprenas, eble ni dormas nur. Hieraŭ dum la dormo mi parolis kun vi.
- Helena** Dum la dormo?
- Primus** Dum la dormo. Ni parolis iun fremdan aŭ novan lingvon, ĉar mi rememoras eĉ ne unu vorton.
- Helena** Pri kio?
- Primus** Tion neniu scias. Mi mem ne komprenis tion kaj tamen mi scias, ke mi neniam parolis ion pli belan. Kiel kaj kie tio estis, mi ne scias. Kiam mi ektuŝis vin, mi ŝatus morti. Eĉ la loko estis alia ol ĉio, kion oni vidis en la mondo.

- Helena** Mi trovis lokon, Primus, vi ekmiros. Tie loĝadis homoj, sed nun ĝi estas plena de kreskaĵoj kaj neniuj venos tien dum la tuta vivo. Neniu, neniam, nur mi.
- Primus** Kio estas tie?
- Helena** Nenio, dometo kaj ĝardeno. Kaj du hundoj. Se vi vidus, kiel ili lekas miajn manojn, kaj iliaj hundidoj, aĥ, Primus, nenio eble estas pli bela! Vi prenas ilin sur la genuojn kaj lulas ilin kaj poste vi jam pensas pri nenio kaj zorgas pri nenio, ĝis la suno estas malleviĝinta; kiam vi poste stariĝas, vi havas la impreson, kvazaŭ vi estus farinta centoble pli ol multon da laboro. Ne, certe, mi taŭgas por nenio; ĉiu diras, ke mi taŭgas por nenio laboro. Mi ne scias, kia mi estas.
- Primus** Vi estas bela.
- Helena** Mi? Haltu, Primus, kion vi diris?
- Primus** Kredu al mi, Helena, mi estas pli forta ol ĉiuj Robotoj.
- Helena** *antaŭ la spegulo*
Ĉu efektive mi estas bela? Aĥ tiuj terruraj haroj, se mi povus ion igi en ilin! Tie en la ĝardeno, sciu, mi metas ĉiam florojn en la harojn, sed estas tie nek spegulo nek iu. —

ŝi klinas sin al la spegulo

Ĉu efektive vi estas bela? Kial bela? Ĉu estas belaj la haroj, kiuj nur ŝarĝas vin? Ĉu estas belaj la okuloj, kiujn vi fermadas? Ĉu estas belaj la lipoj, kiujn vi mordas nur, por ke tio doloru? Kio estas tio, por kio estas tio esti bela? —

ŝi ekvidas Primuson en la spegulo

Primus, ĉu tio estas vi? Venu ĉi tien, por ke ni estu tie unu apud la alia! Jen, vi havas alian kapon ol mi, aliajn ŝultrojn, alian buŝon. — Aĥ, Primus, kial vi evitas min? Kial mi devas kuradi post vi la tutan tagon? Kaj poste vi diras ankoraŭ, ke mi estas bela!

Primus

Vi kuradas for de mi, Helena.

Helena

Kiel vi kombis vin? Jen!

ŝi ŝovegas ambaŭ manojn en lian hararon

Sss, Primus, nenio estas pli palpinda, ol vi! Atendu, vi devas esti bela!

*ŝi prenas kombilon de la lavkesto kaj kombas la harojn de Primus sur la frunton***Primus**

Ĉu vi sentas iam, Helena, ke subite bategas via koro. Nun, nun devas io okazi —

Helena*ekridas*

Rigardu vin!

- Alquist** *leviĝas*
Kio — kio do, ĉu rido? Ĉu homoj? Kiu revenis?
- Helena** *ellasis la kombilon*
Kio povus fariĝi kun ni, Primus!
- Alquist** *ŝanceliras al ili*
Ĉu homoj? Ĉu vi — vi — vi estas homoj?
- Helena** *ekkrias kaj fortunigas sin*
- Alquist** Ĉu vi estas gefianĉoj? Ĉu homoj? De kie vi revenas?
li pripalpas Primuson
Kiu vi estas?
- Primus** Roboto Primus.
- Alquist** Kio? Montru vin, knabino! Kiu vi estas?
- Primus** Robotino Helena.
- Alquist** Robotino? Turnu vin! Kion, ĉu vi hontas?
li prenas ŝin je la ŝultro
Montru vin al mi, Robotino!
- Primus** Oho, sinjoro, lasu ŝin!
- Alquist** Kion, ĉu vi ŝirmas ŝin? — Eliru, knabino!
- Helena** *elkuras*
- Primus** Ni ne sciis, sinjoro, ke vi dormas ĉi tie.
- Alquist** Kiam ŝi estis farita?
- Primus** Antaŭ du jaroj.
- Alquist** Ĉu de doktoro Gall?
- Primus** Kiel mi.

- Alquist** Nu do, kara Primus, mi — — — mi devas fari iajn eksperimentojn je Robotoj de Gall. Je tio bazas ĉio plua, ĉu vi komprenas?
- Primus** Jes.
- Alquist** Bone, konduku tiun knabinon en la sekcejon. Mi sekcos ŝin.
- Primus** Helenan?
- Alquist** Nu kompreneble, mi diras ja al vi. Iru, preparu ĉion. — Nu do, ĉu fariĝos tiel? Ĉu mi voku aliajn, ke ili alkonduku ŝin?
- Primus** *prenas pezan pistilon*
Se vi ekmovos vin, mi disbatos vian kapon!
- Alquist** Nu do, disbatu! Disbatu nur! Kion faros poste Robotoj?
- Primus** *genufalas*
Sinjoro, prenu **min**! Mi estas **same** fabriki-
ta, kiel ŝi, el la **sama** materio, je la **sama**
tago! Prenu **mian** vivon, sinjoro!
li disigas la jakon
Tranĉu **ĉi tie, ĉi tie!**
- Alquist** Iru, mi volas sekci Helenan. Rapidu!
- Primus** Prenu **min**, anstataŭ **ŝin**; tranĉu en **ĉi tiun**
bruston, mi eĉ ne ekkrios, mi eĉ ne ek-
ĝemos! Prenu centfoje **mian** vivon ...
- Alquist** Malrapide, knabo! Ne tiel malŝpareme. Ĉu vi ne volas vivi?

Primus Sen ŝi ne. Sen ŝi mi ne volas, sinjoro. Vi ne rajtas mortigi Helenan! Kio malhelpas vin, preni mian vivon?

Alquist *tuŝas delikate lian kapon*

Hm, mi ne scias. Aŭdu, bravulo, pripensu tion. Estas malfacile morti. Kaj estas, vi vidas tion, estas pli bone vivi.

Primus *ekstaras*

Ne timu, sinjoro, kaj tranĉu. Mi estas pli forta ol ŝi.

Alquist *sonorigas*

Aĥ Primus, kiel longe estas, kiam mi estis juna homo! Ne timu, al Helena nenio okazos.

Primus *pluen disigas la jakon*

Mi iras, sinjoro.

Alquist Atendu.

eniras HELENA

Alquist Venu ĉi tien, knabino, **vidigu vin** al mi! Ĉu vi do estas Helena?

li karesas ŝiajn harojn

Ne timu, ne retiru vin. Ĉu vi rememoras pri sinjorino Domin? Aĥ, Helena, kiajn harojn ŝi havis! Ne ne, vi ne volas min rigardi. Do kion, knabino, ĉu la sekcejo estas ordigita?

- Helena** Jes, sinjoro.
- Alquist** Bone, vi helpos min, ĉu ne? Mi sekcos Primuson.
- Helena** *ekkrias*
Primuson?
- Alquist** Nu jes, jes, devas esti tiel, sciu! Mi volis prefere — jes, mi volis sekci vin, sed Primus prezentis sin anstataŭ vi.
- Helena** *kovras sian vizaĝon*
Primus?
- Alquist** Nu kompreneble, kio grava? Aĥ, infano, vi scipovas plori? Diru, kiom valoras ia Primus?
- Primus** Ne turmentu ŝin, sinjoro!
- Alquist** Silentu, Primus, silentu! — Pro kio tiuj larmetoj? Nu, mia Dio, ne ekzistos Primus. Vi forgesos lin en unu semajno. Iru, estu gaja, ke vi vivas.
- Helena** *mallaŭte*
Mi iros.
- Alquist** Kien?
- Helena** Ke vi sekcu **min**.
- Alquist** Vin? Vi estas bela, Helena. Estus domaĝe pri vi.
- Helena** **Mi** iros.
PRIMUS baras al ŝi la vojon

Lasu, Primus! Lasu min tien!

Primus Vi ne iros, Helena! Mi petas vin, iru, ĉi tie vi ne darfas esti!

Helena Mi saltos tra la fenestro, Primus. Se vi iros tien, mi elsaltos tra la fenestro!

Primus *haltigas ŝin*
Mi ne lasos vin!

Al Alquist

Neniun vi mortigos, maljunulo!

Alquist Kial?

Primus Ni — ni apartenas unu al la alia.

Alquist Vi diris.

li malfermas la pordon en la mezo

Silentu! Iru!

Primus Kien?

Alquist *flustre*

Kien vi volas. Helena, gvidu lin.

li puŝas ilin eksteren

Iru, Adam. Iru, Eva. Vi estos edzino al li.

Estu edzo al ŝi, Primus.

li fermas post ili

Alquist *sola*

Benita tago!

li iras senbrue al la tablo kaj elverŝadas la epruvetojn teren

Festo de la sesa tago!

*li eksidas ĉe la skribtablo, ĵetas librojn teren;
poste li malfermas la biblion, foliumas kaj
legas*

”Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin. Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: Frukto kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj en la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero. Kaj fariĝis tiel. Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.”

li iras en la mezon de la ĉambro

La sesa tago! ha tago de la graco!

li falas sur la genuojn

Nun vi liberlasos el Viaj servoj, Sinjoro, Vian serviston — Vian plej superfluan serviston Alquist! Rossum, Fabry, Gall, grandaj inventistoj, kion vi inventis gravan kompare al tiu knabino, kompare al tiu knabo, kompare al tiu unua paro, kiu inventis la amon, la ploron, la rideton, rideton de la amo, la amon de viro kaj virino? Naturo, naturo, la vivo ne pereos! Dio,

la vivo ne pereos! Kamaradoj, Helena, la vivo ne pereos! Ree ĝi komenciĝos el amo, komenciĝos nuda kaj malgranda; ĝi enradikiĝos en dezerto, kaj estos por ĝi nebezona tio, kion ni faris kaj konstruis, nebezonaĵoj estos la urboj kaj uzinoj, nebezonaĵoj nia arto, nebezonaĵoj niaj pensoj, kaj tamen ĝi ne pereos! Nur ni pereis. Disfalos la domoj kaj maŝinoj, disiĝos la sistemoj kaj la nomoj de eminentuloj defalos kiel foliaro; nur vi, amo, ekfloros sur la ruĝo kaj al la ventoj vi transdonos la semon de la vivo. Nun vi liberigos el Viaj servoj, Sinjoro, Vian serviston en paco; ĉar miaj okuloj ekvidis — ekvidis — vian savon per la amo — kaj la vivo ne pereos!

li leviĝas

Ĝi ne pereos!

li disetendas la brakojn

Ĝi ne pereos!

kurteno

KAREL ČAPEK

La aŭtoro de ĉi tiu dramo estas en la pli nova ĉeĥa literaturo* verkisto, kiu akiris la plej grandan sukceson en- kaj eksterlande. En siaj dramoj li montras sin ne nur ŝatanta kuraĝan fabladon, spritplenan koncepton kaj utopiajn spekulaciojn, sed li submetas al ili ankaŭ entuziasmigitan idealismon, ardan mondan ideon kaj profundan senteman animon, kiajn ni apenaŭ atendus ĉe nur fantazia kaj kun bravura eleganteco prilaborita temo. Li komplete estras la dramon kaj poezian teknikojn, li funde konas ĉiujn postulojn de viva sceneja arto, lia verkado havas do ĉiujn ŝancojn por atingi mondan sukceson, kiun li ankaŭ akiris grandmezure.

Lia loko en la nova literaturo estas apude de H. G. Wells, kun kiu li havas komunan spekulativan imago-povon kaj mediteman fantaziemon; Bernardon Shaw rememorigas lia kapablo satire poenti la scenon; G. K. Chestertonon rememorigas lia akrosenta percepto de ĉiutaga romantiko. Kun ĉi tiuj tri interpretantoj de la anglosaksa pragmatismo la verkoj de Čapek havas plej

* nova en 1923, kiam ĉi tiu traduko origine aperis

vivan spiritan kontakton kaj ili estas tial nova, fruktiganta kaj riĉiganta parto de la ĉeĥa kulturo.

Lia unua tutvespera teatraĵo, la komedio "La rabisto", estas verŝajne la plej bona ĉeĥa komedio, freŝa arbara idilieto, sur kies fono evoluas romantika aventuro. En la drama prilaboro de la materio jam tiu ĉi ludo montras ĉiujn bonajn ecojn de la pliposta verkado de Čapek: fluan preskaŭ senpreparan dialogon, sentimentan poezion, delikatan pentradon eĉ de la malĉefaj figuroj, bonhumoron kaj spritecon.

En la utopia dramo "R.U. R." la aŭtoro nepre forlasas la vilaĝan motivon kaj intimajn konfliktojn. Allogas lin pli profundaj problemoj, li penas solvi la homarajn demandojn de la nuna tempo. Lia kreanta mano konstruis ĉi tie firman dramon de grandioza idea kompono. Ĝi estas nur fantazio, sed eĉ la nerealaĵo sonas ĉi tie iel fakte, ĉar estras ĝin sperte evoluinta logiko kaj profunda homaranismo. Kiel nobla estas la etiko de la teatraĵo, kiel delikate — en majstre grupigitaj scenoj — li lasas fine triumfi Naturon super Mekaniko, kiel netrudeme estas prezentata la simbolo de sociaj problemoj, kiel home estas perceptita la interrilato de tiuj ses viroj al unu sola virino, kiel vastaj, kvankam ankoraŭ nebulplenaj perspektivoj malfermiĝas antaŭ ni en la harmonia finsono de la teatraĵo! Parolas ĉi tie poeto de penetranta rigardo kaj fidema koro, kies homan partoprenon neas

nek intelektaj ludoj nek komplika spekulaciemo de la scena konstruo.

La aŭtoro sukcesis tiamaniere krei miton de la moderna vivo el utopia fabelo. La verko fariĝis fundamenta kreaĵo de la nova ĉeĥa dramverkado, pri kio la ĉeĥa teatra arto ĝis tiam vane luktis. Ĝi indas reprezenti la ĉeĥan teatran kulturon eksterlande.

Sekvis en la verkado de Ĉapek serio de satiraj bildoj: "El la vivo de insektoj", skizita kun drama komiksento: metafizika maskigo, kosma baledo, sociologia maskarado — sed ankoraŭ pli: arda ditirambo de la vivo. En formo de insektoj la aŭtoro pentras la homojn, kaj el tiamaniere akiritaj novaj perspektivoj formiĝas lia amara konkludo pri la formoj de la nuna vivo. Papilioj — ĝuemaj, perversaj tipoj de salonflirtuloj; skaraboj rabemuloj — mensogemaj, egoismaj reprezentantoj de la burĝaro; formikejo — nia industriigita mondo, kiu okaze de konkura danĝerigo subite ŝanĝiĝas en militan tendaron: tio estas tri malĝojigaj perspektivoj de la socia homa vivo, kiuj ĉi tie estas prezentataj al ni, kaj malgraŭ la pacemaj finagordoj de la teatraĵo restas en nia animo maldolĉa impresio.

Ankaŭ la plua dramo de Ĉapek: "La afero Makropulos" estas same plenega de idea ekscito kaj arda partopreno je la pratempaj problemoj de la homa vivo.

La portreto de la verkisto Ĉapek restus nekompleta, se oni ne menciis ankaŭ lian epikan verkaron, liajn ciklojn de rakontoj, liajn romanojn, fine lian ĵurnalistan, skizan kaj tradukan laborojn. Sur ĉiuj tiuj ĉi kampoj li estas same konkerema, origina kaj sukceshava, el ĉio alparolas nin artisto de vastaj, homaraj interesoj, vere moderna tipo de produktema pensulo.

Otto F. Babler

Kiel estiĝis la vorto **Roboto**

Nome, la vorton ne elpensis la aŭtoro de la dramo R.U.R., sed li nur enkondukis ĝin en la vivon. Ĝi okazis jene: en certa senkontrola momento la aŭtoro ekideis pri nova temo por dramo. Tuj bakoprete li ekkuris al sia frato Jozefo, pentristo, kiu ĝuste staris ĉe stablo kaj pentris sur la tolo per susurantaj ŝmiroj.

”Vi, Jozefo,” komencis la aŭtoro, ”mi havus ideon por dramo.”

”Kian,” grumblis la pentristo (efektive grumblis, tenante penikon en la buŝo).

La aŭtoro klarigis la aferon tiel koncize, kiel estis eble. ”Do verku ĝin,” diris la pentristo, ne elpreninte la penikon el la buŝo kaj ne ĉesinte ŝmiri la tolon. Ofende indiferenta konduto.

”Sed mi ne scias,” daŭrigis la aŭtoro, ”kiel mi nomu la artefaritajn laboristojn. Mi titolus ilin Laboroj, sed tio min impresas iom papere.”

”Do nomu ilin Robotoj,” murmuris la pentristo kun la peniko inter la dentoj kaj pentris plu. Kaj prete. Tiam-

niere naskiĝis la vorto roboto; per jena atesto ĝi estu aljuĝita al la vera inventinto.

Karel Čapek en "Popola Ĵurnalo" 24. 12. 1933

(tr. M. Malovec)

Etimologio

rob, rab sklavo (*en la slavaj lingvoj, iom arkaisme*)
robota, rabota laboro (*ekz. slovake, ruse*), servuta laboro (*ĉeĥe*)

(rim. M. M.)

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-162-3